XVIII^{a} jaro. N° 262 (6) ☆ Monata ☆ Junio 1922

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

JARA ABONO

Simpla abono	10.— Fr. Sv.
Kun la membreco de UEA	12.50 Fr. Sv.
Unu numero	1.— Fr. Sv.

Svisa poštĉeko I.2310. — La abonoj komenciĝas en januaro

REKLAMO

Anonco (unu-centimetra kolonero)	2.— Fr. Sv.
Anonceto (1 linio: 10 vortoj)	0,50 Fr. Sv.
Korespondado (1 enskribo)	0,75 Fr. Sv.

Rabatoj: 3 enpresoj 10%; 12 enpresoj 25%

FONDINTO: HECTOR HODLER

GVIDANTO: D-ro EDMOND PRIVAT

ADRESO DE LA REDAKTEJO KAJ ADMINISTREJO: 12, BOULEVARD DU THÉÂTRE, GENÈVE

La Redaktejo ne povas resendi manuskriptojn. Lasta dato por ricevo: la 15^{a} de ĉiu monato. Oni skribu tre legeble kaj konservu kopion.

TEKSTO. — *Pri organiza problemo en Helsinki,* Edmond Privat. — **Edukado:** *Laborinstruo, laborlernejo,* P. Trarbach. — *Instituto J.-J. Rousseau,* Pierre Bovet. — *Gramofono por lingva studado,* J. Merchant. — **Literaturo:** *El melodiaj popolaj,* Marja Konopnicka. — *Momentoj,* Julio Baghy. — *Petroselo,* L. Fulda. — *Tra la libraro,* G. S. — *Esperantista Literatura Asocio.* — **Esperantismo:** *XIV. Kongreso.* — *Kroniko.* — *Movado en Azio.* — *La demando pri Ĝenerala Organizo.* — *Oficiala Informilo de UEA.* — *Antaŭ- kaj Postkongresoj.* — *Tra la gazetaro.* — *Tra la fakoj.* — *Esperantista Parolejo.* — *Esperantista Vivo.* — *Niaj Mortintoj.* — *Ŝako.*

Pri organiza problemo en Helsinki

Ni publikigas la projekton de Statuto por Universala Esperantista Ligo verkitan de S-ro Page, prezidanto de la Komisiono elektita en Hago kaj konfirmita en Praha. Pri ĝi ni atendas opiniojn de niaj delegitoj kaj de niaj membroj de UEA por ke ni povu diskuti en Helsinki konante la diversajn opiniojn.

La problemo estas ankoraŭ malfacila kaj oni devas danke laŭdi al S-ro Page pro lia granda laborado kaj konstanta fido. Estas fakto ke li estas la plej esperplena kaj entuziasma ano de la Komisiono.

La Prezidantoj de la Centra Oficejo kaj de UEA generalo Sébert kaj S-ro Stettler, kiuj havas longan sperton pri administrado, havas gravajn dubojn pri la praktika efektivigebleco de la tuta afero. Fakte nek unu, nek la alia estas entuziasmaj pri la projektita — iom komplika — duobla maŝinaro.

Certe S-ro Page verkis kiel eble plej liberalan sistemon klopodante kontentigi ambaŭ. Oni ja scias ke tio estas ĉiam malfacila tasko. Generalo Sébert ŝatus revivigi la Unuiĝon de Naciaj Societoj. S-ro Stettler pli fidas je personaj membroj laŭ financa vidpunkto. Bedaŭrinde ambaŭ viroj havis gravan malfacilaĵon dum tiu ĉi vintro. Generalo Sébert ricevis dolorigan familian ĉagrenon, pro kiu la tuta esperantistaro simpatiis al li profunde. S-ro Stettler estis daŭre malsana.

Financaj demandoj, treege gravaj, ĝis nun ne estis diskutitaj inter ili. Oni ja scias ke generalo Sébert malavare subtenis mem la Centran Oficejon. Tial oni ne rajtas postuli de li kalkulojn. Siaflanke S-ro Stettler hezitas memkompreneble rekomendi al UEA nekonatajn riskojn.

Ĉiuokaze laŭ la deziresprimo de la lasta UEA kongreso kaj ankaŭ laŭ la svisaj leĝaj cirkonstancoj, UEA ne povus fordoni sian nomon, ĝi devas resti senŝanĝa, se oni akceptas ĝeneralan aranĝon. La francaj samideanoj ne ŝatas la vorton „Ligo“ kaj la tuta esperantistaro estas ja kutiminta je la nomo de UEA. Ne tie kuŝas la malfacilaĵo. Pri la nomo oni ja facile konsentos.

La ĉefa malhelpo estas la manko de entuziasmo ambaŭflanke. Fakte ĉiu estas tentata iri sian vojon kaj daŭrigi la amikajn rilatojn kaj neformalan kunlaboradon sen iu maŝina interdependeco. Ankaŭ la oficiala malfavora sinteno de la nuna franca registaro kontraŭ nia afero kaŭzas seriozan pripenson.

Estos por la esperantistoj mem esprimi sian opinion. Ni ĝin atendas kun granda intereso kvankam ĝenerale la organiza problemo ne entuziasmigas nian publikon. Dum tiu ĉi jaro aliaj eksteraj problemoj nin multe pli okupas. Ankaŭ tute prave. La enkonduko de Esperanto en lernejojn, la progreso ĉe la Ligo de Nacioj pasas antaŭ ĉio en niaj zorgoj.

Unu afero ĉiuokaze eliras klare: Ke niaj Lingvaj Institucioj restas kaj restu sendependaj de iu ajn aparta organizo kaj konservu la unuecon de la lingvo.

Edmond Privat.

Al niaj legantoj!

Nia proksima N-ro julio-aŭgusto aperos komence de ju lo kaj estos duobla; same kiel tiu de septembro-oktobro aperonta komence de septembro.

EDUKADO

Laborinstruo, laborlernejo

De rektoro *P. Trarbach.*

En kelkaj landoj la laborinstruo estas pli malpli enkondukita; en aliaj oni ĝin ankoraŭ malakceptas. Laŭ la konstitucio de la Germana Respubliko laborinstruo estas instrufako de la lernejo. Kiel tiu instruo estas donota, kaj kion ĝi estas celonta, tion nur malmultaj scias precize; ĉar *komplete organizita laborlernejo* troviĝas hodiaŭ nur malofte. En Germanujo tia ne ekzistas; ankaŭ en Munĥeno, ĉefurbo de Bavarujo, kie oni enkondukis la laborinstruon *prove*, oni ne havas kompletan laborlernejon. Nur en la 4 malsuperaj klasoj de tri lernejoj kaj en la supera klaso de ĉiuj lernejoj laborinstruo estas donata, nome ĉiusemajne 2 lecionoj, je kiuj ĉiuj lernantoj, knaboj kaj knabinoj, partoprenas, kaj ĉiuj faras la samajn objektojn.

Glu- kaj metallaboroj tie ne estas farataj, kaj modelado ne estas instruata, sed precipe laboroj en ligno estas farataj; ĉar tiaj objektoj ofte estas uzataj en la scienca instruo, la laboroj povas esti farataj precizege, la ŝtofo estas malkara, kaj knaboj kaj knabinoj havas grandan intereson pri ĝi; krome ili ofte donas okazon por la laborkomuneco. — Estas farataj: ŝtupetaroj, lignokuboj, malgrandaj veturiloj, lignaj konstruokestoj, glitveturiloj, liniiloj, skizoj de la lernejo, ligna domo (laborkomuneco), seĝoj, metroj, gimnastikiloj ktp.

Plie tiu ĉi lernejo postulas instruon sub libera ĉielo kaj ĝardenan laboron; ankaŭ dum la lasta la infanoj povas akiri konojn.

Ankaŭ oni parolas pri *laborinstruo kiel principo*, je kio managado povas tute manki; gvidate de l'instruisto, la lernantoj devas mem akiri, mem perlabori la konojn kaj sciojn, kiel la doktrinon de historio, rakonto, la konojn en naturscienco ktp., okupante ĉiujn fortojn de l'spirito.

PROF. P. BOVET

DIREKTORO DE LA PEDAGOGIA INSTITUTO J.-J. ROUSSEAU, GENÈVE, INVITINTO DE LA KONFERENCO PRI ESPERANTO EN LERNEJOJ.

Kion oni volas celi, aspiri per tiu instruo? Nia edukado kaj instrumetodo, diras la anoj de la lernejo, devas akomodi sin al la hodiaŭaj cirkonstancoj. Anstataŭ provizi la lernantojn je konoj, scio, iliaj spiritaj kapablecoj devas esti disvolvataj, por ke ili mem povu akiri konojn, kiel la homo akiris tiajn laborante. Per tio la lernado fariĝas agado do l'esplorado. Antaŭ ĉio la manoj, la sentoj kaj la spiritaj kapablecoj devas estas disvolvataj, por ke ili estu uzeblaj por la memstara laborado. Scio estas povo, potenco nur se oni scias ĝin uzi.

Hodiaŭ oni sciigas al la lernantoj multon, kion ili povas mem trovi. La infanoj lernas, anstataŭ labori, perlabori; do la hodiaŭa lernejo estas nomata lern-lernejo (germane: Lernschule) kontraŭe de la laborlernejo.

Kun la scio, amasigita per la memoro, la homoj regule ne povas entrepreni ion; memstaraj kaj produktivaj homoj ne povas esti edukataj per tio. Per la sciigado de konoj oni ankaŭ ne povas plibonigi la homojn. Multvaloraj spirito- kaj valorfortoj povas disvolviĝi nur sur la fundamento de konoj akiritaj per propra laboro, per propra observado kaj propra pensado.

Per la laborado, segnado, formado, produktado en la laborlernejo, ĉiuj partoj de la homa disvolvo estas akcelataj, precipe la mano estas perfektigata, kaj la laborinstruo, kiu iniciatas multe da movadoj, ne havas tiajn malutilajn efikojn por la sano kiel la hodiaŭa instruo.

La laboro ja ankaŭ kondukis la homojn sur la nunan kulturaltecon. En la evoluo de la homaro ĝi ludis grandan rolon. Ĝi multe kunhelpis, eduki la homon al la kulturhomo. Nur kiam la homoj komencis, fari ilojn por labori kun ili, iliaj manoj estis ekzercataj, kaj delikatiĝis. Iloj estas eltrovoj de la homa spirito sed aliflanke ili kunhelpis la evoluon de la homa spirito; ĉar per la agado de l'mano la cerbo estas esence influata, kaj aliflanke la mano estas direktata de la cerbo. La fiziologio ja montras, ke la manlerteco ne havas sian sidon en la mano, sed en la cerbo.

El tio rezultas jeno: Ne ekzistas laboro de l'mano, kiu samtempe ne estas ankaŭ cerblaboro; tial la managado estas vojo kondukanta al la cerbo, kaj la instruo en manlaboro estas speco de spirita edukado.

La manlaboro efikas ankaŭ favore sur la evoluon, klerigon de l'intelekto kaj edukon de l'volo; ĝi ne estas nur io meĥanika, kiel multaj homoj opinias. Laborante oni devas pensi; ja, delikata manlaboro postulas multe da medito kaj koncentrigon de l'pensoj. La disvolvo de l'homoj ne povas okazi sen serioza laboro. Ju pli alta estas la kulturo de popolo, des pli la laboro nobeliĝas. La laboro, la edukado al la ŝatado de l'laboro kaj al la volo al la laboro estas rimedo por la konservado de l'kulturalteco. „Kuŝas daŭranta nobleco kaj eĉ io sankta en la laboro.“

Por la disvolvo de l'pensforto estas necesaj klaraj kaj simplaj imagoj, kaj tiujn ĉi la infano ricevas antaŭ ĉio el la konkretaj objektoj, je kiuj la laborinstruo okupas la lernantojn precipe.

En la hodiaŭa lernejo oni volas efiki sur la volon precipe per historioj, rakontoj; la infano, ekkonante la bonajn ecojn de iliaj personoj decidas, imiti ilin. Sed la volado devas fariĝi agado; tio ne povas okazi en la lernolernejo, dum en la laborlernejo ĉe la komunaj laboroj ofte troviĝas okazo por tio.

Ĉar ĉiuj korpaj laboroj kunhelpas eduki la volon kaj ekzerci la homon, estri sin mem, troviĝas ofte en laborejoj la sentenco: „Ekzercu la okulon, lertigu la manon! Fortiga fariĝas la volo, sagaca la intelekto.“

La laborlernejo zorgas ankaŭ plej bone pri la vivo. La disvolvo de l'homo ja konsistas en tio, ke li enkreskas en la hodiaŭan kulturon; instruante do ni ne povas fari ion pli bonan ol akceli tiun ĉi evoluon kiel eble plej bone. La hodiaŭa lernejo ne faras tion; ĝi ne zorgas pri kompreno, ŝtofo kaj boneco de l'laboro, pri disvolvo de l'gusto, konado de l'transportaj aferoj ktp. Je ĉio ĉi lernejo de la l'estonteco (la laborlernejo) okupas la lernantojn; ĝi liveros al la vivo agemajn kaj produktantajn homojn. Ni esperu, ke la nova lernejo plenumos, kion ĝi promesas!

Instituto Jean-Jacques Rousseau

La ĵurnalo „Esperanto“ jam eldonis interesan artikolon de D-ro Percy Milner pri la Instituto Rousseau. Tamen post la Ĝeneva Kunveno pri esperanto en lernejoj la redaktisto tre afable petis de mi, ke mi donu kelkajn detalojn pri nia fondaĵo. Dankante por la intereso tiel montrita pri nia entrepreno, mi nur mallonge priparolos ĝian celon.

La Instituto J. J. Rousseau kiu havis la honoron kunvoki la Ĝenevan Konferencon tute ne estas esperantista lernejo. Ĉiuj kursoj estas franclingvaj.

Nia Instituto estas centro de studado eksperimenta pri ĉiuj sciencoj rilataj al la infanoj kaj al la eduko. Ni kredas ke antaŭ ŝanĝi la lernejojn, la programojn k. t. p. estas necese studadi la infanon kaj koni lin pli bone ol ni lin konas hodiaŭ. Tion signifas la latina devizo : *Discat a puero magister* „Lernu de knabo la instruisto“. Ni ankaŭ kredas ke se la diskutoj pedagogiaj estas tre ofte neutilaj, ili povus fariĝi pli utilaj, se ni estus klopodantaj mezuri la rezultojn de ĉiuj metodoj, de ĉiu instruado.

Ni ŝatus rikolti faktojn precizajn. Ni ne plu volas antaŭjuĝi problemojn malfacilajn simple laŭ opinioj kiuj ne estas pruvitaj. Ĉiufoje estas necese demandi la faktojn kaj poste doni opinion firmigitan.

Tiel ni renkontis pri esperanto multajn opiniojn, kiujn ni ne povis akcepti kiel justajn aŭ science studitajn. Ni volis kunigi faktojn, petante ilin de la homoj kiuj ilin konas, kaj por tio ni kunvokis la konferencon. Laŭ tiu spirito la Instituto J. J. Rousseau, fondita en 1912 de la fama Ĝeneva psikologisto D-ro Ed. Claparède, celas orienti en la pedagogia fako personojn sindonantajn al iu ajn eduka profesio. Ni ne estas precize „Normala lernejo“ kiel estas en ĉiuj landoj por prepari geinstruistojn. Inter tiuj lernejoj kaj nia estas tiu ĉi granda malsameco: ili preparas instruistojn laŭ programo antaŭe rekonita de la registaro; ni kontraŭe insistas diskuti la programon mem, ne ligante nin al iu ajn antaŭjuĝo.

Inter niaj gelernantoj ni havos estontajn estrinojn de infanĝardenoj, geinstruistojn por „novaj lernejoj“ (kiujn la Germana D-ro Lietz nomis „edukajn kamparhejmojn“), profesorojn por normalaj lernejoj, agentojn por sociaj laboroj rilataj al la junuloj : infantribunaloj, filantropaj hejmoj k. t. p.

Ĵus ni komencis prepari ankaŭ gekonsilistojn pri profesia orientado, kaj specialistojn pri teknopsikologio (psikologio de industria laboro).

La vojoj, vi vidas, estas multaj, sed la centra punkto sur kiu niaj studantoj sin bazas estas unu sama por ĉiuj : metoda studado pri la infano kaj junulo, pri lia psikologio, lia pensado, liaj sentoj, liaj ludoj. Unue penadi por koni lin, nur poste klopodi por lin eduki.

La kompleta tempo de studado en la Instituto J. J. Rousseau estas du jaroj. Post la unua jaro oni ricevas „Ateston pri studado“; post du jaroj „Diplomon“. Ni jam havis gestudantojn el ĉiuj Europaj kaj Amerikaj landoj. Ni tre volonte kaj kiel eble tiel bone akceptos tiujn, kiuj, aŭdinte pri ni okaze de la Ĝeneva Konferenco, venos al ni kiel esperantistoj. Ili certe portos al ni novan entuziasmon, riĉan kaj diversan spertadon. Bonvenon al ili!

Pierre Bovet.

Gramofono por lingva studado

Nuntempe multaj anglaj ĵurnaloj, kaj eble multaj en aliaj landoj, enhavas reklamojn de firmoj, kiuj pretendas ke la plej bona metodo por akiri scion de fremdaj lingvoj estas laŭ Naturo; t. e. ke oni uzu la orelojn antaŭ la lango; oni devas aŭskulti antaŭ ol paroli. Pro tio, ke ne ĉiuj personoj povas sekvi tiun metodon pro manko de taŭgaj facilecoj, la cititaj firmoj fabrikis gramofonajn diskojn, kiuj enhavas lecionojn en diversaj lingvoj, kaj vendas ilin kune kun libroj, kiuj enhavas la tekston de la lecionoj, por ke oni povu legi tion kion oni aŭdas.

La metodo estas bonega, sed treege multekosta; kaj mi kredas ke, per fondigo de Internacia Societo Gramofona, ni Esperantistoj povus facile havigi multe pli bonan servon je multe pli malgranda kosto. Jen mia propono: Mi invitas ĉiujn samideanojn, kiuj posedas gramofonojn kaj interesiĝas pri la studado de fremdaj lingvoj, sendi al mi iliajn nomojn kaj adresojn, kun detaloj pri la lingvoj kiujn ili deziras lerni, aŭ pri kiuj ili deziras pliperfektiĝi, por ke mi povu aranĝi interŝanĝon inter ili. Ekz.: Se franco dezirus lerni la anglan lingvon, mi transdonus lian nomon al anglo kiu interesiĝas pri la franca. Poste, ili povus interŝanĝi diskojn kiuj enhavas paroladojn aŭ deklamojn — kantojn oni povus havigi pli malfrue — kune kun la teksto de la enhavoj en la nacia kaj internacia lingvoj. Tiamaniere, oni tuj posedus bonegajn ekzemplojn de la lingvo kiun oni studadas, kaj per ripetado de la reproduko, baldaŭ akirus la povon paroli la samajn frazojn tiel facile kiel la originala parolinto de ili.

Nuntempe, mi mem deziras studadi la elparolon de la itala kaj hispana lingvoj, kaj ankaŭ pliboniĝi mian scion de la franca, sed eĉ se mi povus aĉeti diskojn de paroladoj kaj deklamoj en tiuj lingvoj, mi certe ne povus kompreni tion, kion ili pritraktas sen helpo de teksto mem, kaj tion mi deziras havigi per la helpo de miaj samideanoj, kaj interŝanĝe helpi ilin je iliaj studadoj de mia nacia lingvo.

Mi jam faris kelkajn eksperimentojn rilate al ĉi tiu metodo. Mi posedas diskojn en la lingvo itala de la opero „Aida“, kaj kiam mi reprodukas ilin per la gramofono, mi legas la tekston samtempe, kaj povas kompreni, se ne la plejmulton, almenaŭ multajn vortojn, kaj tio certigis al mi, ke se mi povus havigi paroladojn konsistantajn el ĉiutagaj frazoj anstataŭ nur poeziajn frazojn, mi lernus multe el la aŭskultado, kaj iom post iom akirus povon ripeti ilin prave kaj flue.

Mankas al mi la tempo por daŭrigi la laboradon de organizanto de la proponata societo, sed volonte mi farus la komencan laboradon ĝis la vera fondiĝo de la afero, kaj ĝis kiam ni povus eltrovi taŭgan samideanon por la ofico.

Preskaŭ ĉiuj Esperantistoj havas grandan intereson rilate al la studado de fremdaj lingvoj, kaj mi vere kredas ke mia propono helpus al ili je granda grado, se ni unuiĝus laŭ mia propono. Dum la ĝeneva konferenco kelkaj delegitoj atestis pri la sama temo.

Aliaj gazetoj bonvolu represi.

John Merchant.
(Vic-Prez. de BEA.) 43 Cliffe Field Road, Sheffield.

LITERATURO

El melodioj popolaj

de pola poetino **Marjo Konopnicka**

Mi ensemis ĉe printempo
En la teron
Du kapetojn de filetoj —
Mort'-oferon!
Kiuj vane vi rigardis
En kabano,
Ĉu ne restis por malsataj
Pec' de pano!
Kian frukton havas nun mi
El semaro?!...
Nur la verdajn du krucetojn
Sur tombaro!
Nur maldolĉan tomb-absinton
En vent'-febro
Kaj prunel'-arbuston nigran
En funebro...
Ho! ci, tero, ter' maljuna —
Naskulino!
Vane cin trinkigas nia
Sanga vino;
Niaj ostoj ĉiam vane
Cin manĝigas —
Laborulojn cia pan' ja
Ne satigas!

Tradukis **Leo Belmont.**

* * *

Momentoj

de **Julio Baghy**

Gaja gril'
lule trilas...
En kvadril'
dance brilas
la lampir'...

„Ĉu aŭdas Vi la grilojn kaj cikadojn?“
„Mi aŭdas nur amemajn korobatojn!“

Sorĉe sonas
sonĝon donas
spiro venta
en silenta
nokta hor'...

„Ĉu sentas Vi: karesas ventotuŝo? ¡“
„Mi sentas nur la kisojn sur la buŝo!“

Dum la sun'
ne konjektas,
lum' de lun'
amon plektas
kun zefir'...

„Ĉu vidas Vi ekbrilojn de l'lampiroj?“
„Mi vidas nur la flamon de l'sopiroj!“

Dum mi lulas
arde brulas
flam' feina
en knabina
varma kor'...

„Ĉu dolĉe Vin dormigas sonĝ-feino?“
„Ho, daŭru sonĝ' de am' ĝis morta fino!“

* * *

Petroselo

de *Ludwig Fulda*

„Kamaradoj“, diris la asesoro al siaj amikoj ĉirkaŭ la tablo sidantaj, kiuj lin envie admiris kiel ne kontraŭstareblan ĝenulon; kamaradoj, kredu al mi rilate la virinojn oni neniam scias kiel konduti. Nenia okazo similas al la alia; ĉiu nova sperto montras, ke la antaŭaj estas senutilaj. Do, ne demandu min kiel mi agas; ne postulu de mi ian recepton; ne ekzistas tia. Estas nur la individua metodo. Kaj vere, en tiu mi kredas havi iom da ekzerco; sed kiel mi diras, oni neniam scias bone. Oni estas preparita por ĉio, sed ne por tio, kio okazas. Alie, ĉu mi travivus tiun ĉi nekredeblan historion, kiu... Bone, mi rakontas ĝin al vi.

En la printempo antaŭ du jaroj, kiel vi scias, mi veturis al la jara festo de mia studenta korporacio. Kelkaj tagoj da akademia aero en la malnova, kara urbeto kaj aldone la koncernaj trinkaĵoj — tio donas al la homo kuriozan humoron, tute kuriozan humoron. Tuj post la matentrinko mi devis forveturi. Ankoraŭ salamandro*) kaj ankoraŭ unu: mallonge, mi malfruiĝis, dum la rapida vagonaro estis escepte preciza. „Preta!“ kriis tondra voĉo, kiam mi alvenis sur la peronon. Per tigra salto mi atingis kupeon, malfermis ĝin, ensaltis, la portisto postĵetis al mi la kofreton, kaj jam ekrulis la vagonaro.

Kiam mi nun ekspiras kaj ĉirkaŭrigardas en la kesto, kien mi tiel nevole enflugis, kion mi malkovras kontraŭ mi? Ravan blondulinon! Juna sinjorino, laŭ miaj fakaj scioj inter dudek kaj dedukdujara, en korekta vojaĝkostumo, kiu vidigis, tiel same korektan kreskon, kun ĉarma, ronda, ruĝvanga „Gretchen“ vizaĝo, kies grandaj, malhelbluaj okuloj ekzamenis duone surprizite, duone scivoleme la bruskan entrudulon, por tuj poste, kiam niaj rigardoj kruciĝis, fiksiĝi en ĉarma konfuzo sur la plankon.

Depost jaroj mi ne estis renkontinta ion similan. Kaj mi kun tiu ĉi anĝelo sola! Tia feliĉo neniam estis!

En tiaj okazoj mi kutimas agi sisteme. Mi skizas mian planon laŭ loko kaj tempo. La loko estis fiksita de aminda sorto. Sed, kiel longe? La unua, kion mi faris, estis konsulti mian horlibron. Tutan horon kaj dek minutojn da veturado ĝis la proksima stacio. Fulmotondro, ankaŭ kun la tempo mi povis esti kontenta.

Nun mi komencis observi mian ĉarmegan kontraŭulinon. Sendube, mi faris impreson. Ŝia peno, montri malinteresiĝon, estis tro videbla por ke ĝi povu min trompi. La senkaŭzaj, malgrandaj moviĝoj, la migremeco de la rigardoj, kiuj vane serĉis bazon, perfidis ŝian internan maltrankvilecon. De tempo al tempo min tuŝetis unu el tiuj rigardoj timeme kaj rapide kiel krimulo, timante esti kaptita, por poste fiksiĝi la muron aŭ la plafonon per senkaŭza atenteco. Estis sunklare, ke ŝiaj pensoj okupiĝis per certa aĵo, kaj tiu ĉi aĵo — kun la certeco de natura leĝo — estis mi.

---

*) Salamandro (Exercitium salamandri). La germanaj studentoj nomas tiel la kutimon laŭkomande froti la bierglasojn sur la tablo, ilin malplenigi en unu sola trinko kaj remeti ilin sur la tablon.

Post plejmulte okminuta studo estis firma mia diagnozo. Tiu ĉi ne estis unu el la malvarmaj kaj nevenkeblaj. Tio ne estis la sengusta blondeco de la limonado; tio estis la perlanta, ŝaŭmanta blondeco de la ĉampano. Tiu ĉi anĝelo havis temperamenton; tiu ĉi anĝelo estis diableto. Ĉiun veton mi estus farinta, ke tiuj malfermetitaj, dolĉaj lipoj, kiuj apenaŭ rimarkeble tremis, estis jam kisintaj. Kaj ili denove kisus, se . . .

Kamaradoj, pensu, mi venis rekte de matentrinkado. Estis jam antaŭe al mi varme. Vi ne miros, se mi diras, ke al mi fariĝis pli kaj pli varme ĝis vere tropika varmeco interna. Mi moviĝis colo post colo, ĝis mi sidis rekte kontraŭ ŝi. Ŝi faris, kvazaŭ ŝi ne rimarkus; kaj restis kie ŝi estis. Nur tremo skuetis ŝiajn graciajn membrojn. Jes, tion mi povis kompreni.

Surprize ni estis en tunelo. Se tiu ĉi fervojo estus konstruita nur por tiu ĉi ĉarma aventuro, la tunelo ne povus esti ĉe pli konvena loko. Mi komencis senhezite la antaŭpostenan atakon, ŝovante malrapide, tute malrapide, mian dekstran piedon ĝis mi atingis ŝian beletan piedeton. La piedeto ektremis kaj retiris sin. Ĝi retiriĝis, sed ĝi ektremis!

La tunelo finiĝis. Tiel longe kiel mi vivas, mi neniam forgesos la esprimon de la du malhelbluaj steloj, kiujn mi nun trovis hipnote direktitaj sur min. Nur ĉe ĉasaĵo, kiu ne plu scias kien, proksime staranta al la ĉasisto, mi kelkfoje rimarkis similan esprimon. La plena sendefendeco sin spegulis en ili, sed samtempe, kiel ŝajnis al mi, senspire vibranta streĉeco. Mia Dio, mi ja ankaŭ tremis. La rezultato superis miajn plej kuraĝajn esperojn. Nur nun ne cedi, mi pensis, kaj la venko estas via.

Do, mi komencis. „Plej estimata fraŭlino, ĉar iu bona hazardo nin rekontigis, estus certe tre malprudente, se ni ankoraŭ sidus mute unu kontraŭ la alia. Kaj se mi ankaŭ ne devas flati min, ke vi estas nur duone tiel dankema al la hazardo kiel mi, vi permesus al mi . . .“

Ŝi ne lasis min finparoli. „Petroselo“, diris ŝi per stranga sentona voĉo.

Mi kredis, ke mi malkomprenis.

„Kiel opinias la estimata?“

„Petroselo,“ ripetis ŝi kaj ridetis por si.

Vane mi ĉirkaŭrigardis en la kupeon, elrigardis en la pejzaĝon, por trovi motivon por la cito de la bongusta supherbo. „Pardonu al mi, plej estimata fraŭlino; sed mi ne komprenas . . .“

„Tiel min nomis mia duonflegpatrino, la piteŭmo?“

Ho, ŝi ŝercis. La friponulino povis amuziĝi pri mi. Nu, atendu!

„Petroselon mi treege volonte manĝas!“ mi elkriis, ekpreninte rapide ŝian manon fajre kisante ĝin.

La mano, kiun mi ankoraŭ tenis, estis glacie malvarma. Kaj denove komencis la strange sentona voĉo: „Ĉu estas vi la mortinta vilaĝa poŝtisto?“

Mi lasis ŝian manon kaj rigardis ŝin. Ŝi ridetis — stranga frostita rideto. Diablo, kion signifis tio?!

Nerimarkante mian mutan surprizon, ŝi daŭrigis: „Ĉu vi povas diri al mi, sinjoro, ĉu ni jam pasigis stacion Purigejo?“

Dio, traflugis mian cerbon, tio estas frenezulino!

Kamaradoj, vi povas prezenti al vi, ke mia matentrinka humoro en tiu ĉi momento pasis, kaj ke mia interna termometro montris rapidegan temperaturfalon. Kion mi nur devis fari? Kion mi devis respondi al ŝi? Ĉu la diagnozo, kiu devis esti farita ĉi tie, postulis psikiatriston kaj ne psikologon? Tiel la afero estus ekster mia specialaĵo. Sed eble estis nur momenta malklarigo de la spirito. Tia ja okazas. Eble mi mem ŝin estis tiel aminduminta, ke ĝi efikis tiamaniere. Oni havas ankaŭ pri tio ekzemplojn. Se mi sukcesus ŝin trankviligi, ŝin malfrenezigi . . .

„Fraŭlino,“ mi komencis dolĉe kiel la kompatemulo en la Biblio, „ŝajnas al mi, ke vi ne tute bonfartas . . .“

„Tute ne, tute ne!“ ŝi al mi kapsignis. „Ne priskribeble bone. Mi ja feliĉe forkuris de ili, de la ekzekutistoj kaj de la policistoj. Ĉiujn fenestrojn ili kradigis; sed ne helpis al ili. Mi superruzis ilin, hihi.“

Frenezulino! El la frenezulejo forkurinta frenezulino! Mi demandas vin, ĉu oni povas esti antaŭpreparita je tio. Al mi fariĝis varme, varmege. Per unu vorto, al mi fariĝis malagrable. Colo post colo mi moviĝis for de ŝi.

„Ĉu vi vidas tie mian kofreton?“ ŝi parolis pluen per timige flustra tono. „Ĉu vi scias, kio estas interne? Hihi, mia deviga jako. Mi prenis ĝin kiel memoraĵon. Beleta jaketo ĝi. Ĉu vi volas ĝin probi?“

Furiozulino! Mi estis glitinta ĝis en la plej profunda angulo. La ŝvito pro timo venis sur la frunton; la dentoj surfrapis unu la alian. Kun furiozulino sola. Kaŝite mi rigardis mian horloĝon; bona Dio, preskaŭ ankoraŭ trikvarona horo ĝis la proksima stacio! Ĝis tie ne estis evito, nenia elŝtelo. Kion mi nur dume faros? Kiel mi kondutos? De kie mi povis havi sperton, kiel oni flegas tiajn malsanulojn? Eble ŝin incitus, se mi parolus. Eble ŝin incitos ankoraŭ pli, se mi silentos. Se ŝi pro tio havus atakon? Se ŝi furiozus — kion poste? Tiaj frenezuloj ja devas havi gigantajn fortojn, povas ĵeti la plej fortajn homojn. Se ŝi min kaptus, min sufokus . . . Ne, tion neniu povas postuli de mi.

Ŝi estis malrapide leviĝinta. „Nun komencas,“ pensis mi kaj kunmetis la manojn por preĝokrio.

Per ankoraŭ pli kava voĉo ol antaŭe ŝi diris: „Ĉu vi volas donaci al mi viajn okulojn? Mi havas tutan kolekton de tiaj. Ĉu mi povas ilin elgrati?“

„Ne, ne!“ mi kriis, kvazaŭ mi estus fariĝinta freneza, kaj tiris la alarmilon.

Samtempe ŝi sidiĝis sur sian lokon kaj fariĝis trankvilega. Forta skuo de la vagonaro; post kelkaj minutoj ĝi haltis en la kampo. La kondukisto brumalfermis la pordon kaj demandis: „Kio okazis?“

Per kelkaj vortoj, de mi rapide en lia orelo flustritaj, mi volis al li klarigi mian teruran situacion. Singardeme li proksimiĝis al la kompatindulino, por kiu mi nun sentis senliman bedaŭron, ĉar mi sciis min savita.

Subite ŝi komencis, kaj nun tute ne plu per sentona voĉo, paroli kiel akvofalo. „La sinjoro tie kredas min freneza; sed mi ne estas. Senkulpigu, sinjoro kondukisto, mi vojaĝas unuafoje sola. Kaj la sinjoro fariĝis trudema kaj mi tiel terure timis, mi pripensis, kion fari, por ke li timu. Mia patro estas direktoro de la frenezulejo en N.; pro tio estas al mi facile iom imiti.“

„Kiu tiris la alarmilon?“ kriegis la kondukisto, traborante min kaj ŝin per koleregaj rigardoj.

„La sinjoro tie,“ ŝi respondis, „estas al mi pli agrable, ol se mi devus ĝin fari. Kaj nun donu al mi alian kupeon, mi petas.“

Antaŭ ol mi povis malfermi la buŝon, ŝi estis malaperinta kune kun sia kofreto, ne ĵetante al mi eĉ unu rigardon. Sed la kondukisto revenis tuj al mi koleregante: „Vi eliĝos ĉe la proksima stacio; la afero devas esti ekzamenita . . .“

„Nu, tio ankoraŭ mankis! Superflue!“ mi kriis. „Ĉi tie mia karto kun adreso. Mi estas kulpa. Mi haltigis senpermese kaj senkaŭze la vagonaron. Mi estas preta pagi la punmonon.“

Brue li fermis la pordon; la vagonaro ekmoviĝis, kaj en la iom longa monologo mi diris al mi kelkajn dekduojn da blasfemoj, de kiuj ĉiu estis tiel por ĝin lavi per sango, se iu alia ol la asesoro Kurt Sasvic ilin estus dirinta al mi.

Nun vi scias, kamaradoj! Se eĉ tia sperta konanto kiel mi faras falsegajn diagnozojn, kion oni spertas en tio? Ke oni neniam finstudas en la rilatoj kun la virinoj, kaj ke ankaŭ la individua metodo havas siajn limojn.

El germana lingvo tradukis: Marg. *Iv. Krestanoff.*

TRA LA LIBRARO

Esperanta Legolibro kaj Krestomatio, de *T. Chif.* Osaka „Verda Utopio“, 5265 Uehommachi 7-chome, Minamiku, 1922, XXIV + 253 paĝoj 13 × 18 cm. Tole bindita, prezo nemontrita.

La prezo de tiu bela eldonaĵo estas eble markita per japanaj literoj; tiaj tuj elvekas la scivolemon de Eŭropanoj kaj donas al la presaĵo ian forecan aspekton. Feliĉe por ni, el tiuj strangaj desegnaĵetoj konsistas nur la antaŭparolo, klarigo pri esperantaj versoj kaj notoj privortaj piede de l'paĝoj, ĉar tiu legolibro estos ĉefe uzata de Japanoj. Sed ĉar la tuta cetera enhavo estas nur esperanta, oni same bone povos uzi ĉie tiun bonegan krestomation. Ĝi estas grava kolekto, zorge gradigita, da prozaĵoj kaj poezioj elektitaj el niaj plej valoraj verkoj; tion jam pruvas la tabelo de enhavo, kie oni legas la nomojn: Zamenhof, Grabovski, Kabe, Cart, Hodler, Deŝkin, Nylen, J. Borel, Frenkel, Eska, Bicknell kaj multaj aliaj. Inter pli ol 100 tekstoj estas ankaŭ tradukoj kaj originalaĵoj de la kompilinto. Riĉa kolekto, taŭga elekto, neta preso sur maldika papero, bela tolbindaĵo, ĉio plaĉas en tiu libro. La kelkaj restintaj preseraroj estas plejparte korektataj sur aparta folio. Ŝatinda donaco por samideanoj kaj ornamo por ilia biblioteko.

G. S.

Nova vocabolario Esperanto-Italiano. *G. Meazzini.* Biblioteca della Rivista „L' Esperanto“. A. Paolet, editore, S. Vito al Tagliamento. 1922. VIII + 106 paĝoj, 12 × 16 cm. Prezo: 3·50 Lire — 3 Fr. Fr.

En antaŭparolo, S-ro G. Peano, profesoro ĉe la Universitato de Torino kaj prezidanto de l' „Academia pro Interlingua“ konstatas, ke la adeptoj de Esperanto estas la plej aktivaj propagandistoj por lingvo internacia, kaj ke dank' al iompostioma riĉiĝo de l' vortaroj, la diversaj tiaj lingvoj alproksimiĝas unu al alia, kaj ankaŭ al definitiva akcepto, kiun rezultigos ĉies laboro.

La unua parto de l' vortaro konsistas el ĉiuj radikoj de l' Fundamento kaj de l' oficialaj aldonoj akompanataj de multaj vortoj internaciaj kaj jam akceptitaj en la ĉefaj alilingvaj vortaroj. Ĝi do permesos kompreni ĉiun tekston kaj atingas sian celon: esti ŝatinda laborilo.

Pli nova estas la dua parto pri propraj nomoj. Por la personaj, laŭ la Zamenhofa ekzemplo, multaj virinaj nomoj finiĝas per „io“, ĉar tio ekzistas en pluraj lingvoj, ankaŭ ĉar „in“ jam apartenas al multaj tiaj radikoj, kaj ĉar anstataŭigo de „in“ per „en“ pekas kontraŭ internaciecon. Tamen tro da paroj kiel, nur por litero A: Albino, Albinio, Alekso, Aleksio, Ambrozo, Ambrozio, Anastazo, Anastazio, Anĝeliko, Anĝelikio, Antono, Antonio, Armino, Arminio, Aŭgusto, Aŭgustio, Aŭgustino, Aŭgustinio, Aŭrelo, Aŭrelio, riskas kredigi, ke „io“ estas speciala ina sufikso por personaj nomoj. Ankaŭ por la geografiaj, la regula uzo de l' sama sufikso, eĉ kiam ĝi ne apartenas al la nacilingva radiko, donas vortojn ne volonte akceptotajn; ekzemple: Alsacio, Argentinio, Balkanio, Engadinio, Flandrio, Japanio, Kanadio, Marokio, kaj ĉefe: Finlandio, Grenlandio, Holandio, Irlandio, Kurlandio, Zululandio. Aliflanke ankaŭ atentinda estas la rimarko, ke ĝenerala uzo de „land“, radiko germana, kripligas multajn nomojn precipe latindevenajn.

Do, tralegante la listojn de S-ro Meazzini, oni konscias, ke ankoraŭ ne kontetigan solvon ricevis la demando pri propraj nomoj personaj kaj geografiaj. Sed liaj proponoj utile helpos al plua studado de tiu grava temo.

G. S.

Miedzynarodowy język Esperanto. Esperanto gramatyka w 5 lekcjach. *O. Kuźma.* Nakladem Emy Zimandovej w Kolomyi, Ul. Kościuszki 35. 1922. 18 paĝoj, $10^1/_2 \times 17$ cm. Prezo ne montrita.

La esenco de la strukturo de nia lingvo estas koncize klarigata en tiu broŝuro kiu instigos ricevanton al plua studo. Tiu malkara eldonaĵo estas samtempe propagandilo kaj unua lernilo vekonta intereson por Esperanto.

G. S.

Esperanto-Katechismus. 50 Fragen mit Antworten. *Hanns Sappl,* Professor des Esperanto. Paulus-Verlag, Karmeliterplatz 5, Graz. 32 paĝoj, $10 \times 13^1/_2$ cm. Prezo ne montrita.

En formo de 50 demandoj kaj iliaj respondoj, tiu germanlingva broŝureto koncize klarigas ĉion, kion sam- aŭ eĉ malsamideanoj devas scii pri kialo, deveno, historio, principoj, reguloj, nuna disvastiĝo, utilo, literaturo, ĵurnaloj, societoj, organizo kaj estonteco de nia movado. Trafa kaj lerta nova propagandilo.

G. S.

Das Weltsprachenproblem und die katholische Kirche, von *Hanns Sappl,* Professor des Esperanto. Paulus-Verlag. Graz. 24 paĝoj, $11^1/_2 \times 18$. Prezo ne montrita.

Ankaŭ germanlingva propagandilo diskonigonta Esperanton ĉe katolikaj rondoj. Ĝi klarigas la problemon pri internacia lingvo, ĝian solvon per Esperanto, la specialan valoron de komuna popola lingvo por katolikoj. Laste venas faktoj pri la nuna stato kaj gramatiketo de Esperanto. Bona varbilo por la celata medio.

G. S.

ESPERANTISTA LITERATURA ASOCIO

Junia raporto

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos.

Tre valoraj dokumentoj venis el Parizo, unu el ili havas la titolon: „Kolekto de la Akademio“. Th. Cart. Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto. (Laŭ Universala Vortaro kaj la 3 Aldonoj.) Sur la lasta paĝo troviĝas listo de la ĉefaj landnomoj. Ni citu nur unu tre gravan frazon, kiu per kvazaŭ salomona saĝo solvas problemon: „Neniu motivo *nun* estas por la formo Aŭstrio. La finaĵo *io* (ne sufikso), kiam internacia en landnomo, ne estas kontraŭfundamenta (*Germanio* apud *Germanujo*, kiel *evolucio* apud *evoluo*, Fundamento § 15), sed tamen ne konsilinda, ĉar tute senutila komplikaĵo.“

„Ni semu kaj semu konstante.“ Semeron ni enĵetis en la fruktodonan grundon de la gazeto Esperanto (5. 12. 1916) per alvoko al fondo de naciaj branĉoj de E. L. A. dum la milito. El tiu ĉi semero elkreskis tri entreprenoj; ĉiuj tri celadas la evoluon de nia literaturo. Pri unu el ili, alvoko de s-ro Ziegler-Muenchen (Junio 21) ni ankoraŭ ne povas raporti; en Anglujo ekestis la Brita Literatura kaj Debata Societo. La Societo pro amika rilato al Esp. Lit. Asocio regule al ĝi sendas sian bonan gazeton „Literaturo“. (Aperis 13 n-roj en kajera formo.)

Pri la tria branĉo, „La rusa Sekcio de E. L. A.“ fondita 1909 en Saratov, ni jam iom raportis (vidu Okt. 20). Ĝia celo estas unuigi la rusajn Esp. verkistojn por pli fruktodona, konkorda laboro. Post trijara agado la R. S. havis siam unuan konferencon en Moskvo, la 30an de Marto 1922. Gvidantaro por la jaro 1922 estos: Prezidanto V. Polakov, vicprezidanto S. Haydovski, sekretario N. Nekrasov. Adreso: N. V. Nekrasov, la Tversk.-Jamskaja 35, Moskvo-Rusujo.

La anoj de la Rusa Sekcio kompreneble loĝas disigitaj en Rusujo. Ni deziras al la entrepreno tre bonan sukceson kaj prosperon. Estas esperinde, ke nia komuna laboro portu riĉajn fruktojn. Sendita al mi fotografaĵo prezentas la ejon de la biblioteko de Georgo Davidov kun la surstrata surskribo: Esperanta Biblioteko, Legejo kaj Muzeo. La biblioteko estis rekvirita kune kun alia havaĵo de la formigrinta el Saratov G. Davidov. Gia oficiala malfermo okazis la 14an de Majo 1912 sur la ĉefa „Strato de Respubliko“ N. 40. Ok sinjoroj sinsekve aŭ kune administris la bibliotekon. En Decembro 1921 la registaro rifuzis la materian subvencion al la Biblioteko pro ĝenerala financa krizo. La biblioteko estis transportata supren al la unua etaĝo de la sama domo, kie ĝi troviĝas nun. La prizorgado de tiu ĉi altvalora kolekto estas grava kaj dankinda ago de la Rusa Sekcio de E. L. A.

Jen tre konsiderinda propono de la R. S.: la unua traleganto de ia traduko ĉiam estu samnaciano, lia animo plej bone reflektos kaj komprenos sentojn de la samnacia aŭtoro. La dua kontrolanto estu ĉiam alilingvulo, nur li povos trovi kaj forigi naciismojn. Dezirinde estas, ke ambaŭ apartenu al la kolegaro. Originalan verkon kompreneble tuj legu alilingvulo, ĝi estu tiel klara, korekta kaj fundamentfidela, ke ĉiu samideano en la tuta mondo ĝin facile komprenu.

Al fondontoj de nova gazeto. Bona nova gazeto certe estas pliriĉigo de nia literaturo, ĝi pruvas vivon kaj intereson. Ni tamen atentigas pri granda danĝero: ĉiu nova gazeto malhelpas la malnovajn, kiuj batalas pro sia vivo. Krom tio oni postulas tro multon de la Esperantistoj, ĉiu el ili devus aboni 5—10 gazetojn, tion la plej multaj ne povas.

S-ino Carla Staudner raportas pri „Unua kanta Societo *Zamenhof*“ en Wien, kiu celadas propagandi nian lingvon per la *kanto*. Sub la lerta gvidado de s-ro Theo Jacobsen (Wien VIII., Strozzistr. 40-16) ĝi aranĝas bone vizitatajn koncertojn.

S-ro Ivan Krestanoff (nun en Dresden, Nicolaistr. 4b) tradukas la jenajn verkojn, kiujn konataj germ. Esp. eldonejoj publikigos en Esperanto: el bulgara lingvo: Rakontoj kaj Noveloj, de T. G. Vlajkov (Veselin) kaj elektitaj Noveloj, de Ljuben Karavelov.

El rusa lingvo: En la Antaŭvespero, de Iv. S. Turgeniev. De Georgo Deŝkin esperenble baldaŭ aperos: Ŝanĝema Koro de poeto. (Versaĵoj.) Ferdinand Hirt und Sohn, Leipzig nun eldonis: Internacia Mondliteraturo. Kolekto de plej famaj verkoj el ĉiuj naciaj literaturoj kaj de valorplenaj Esperanto-originaloj. La unua kajero enhavos „Nuntempaj Rakontoj“ de G. P. Stamatov. El bulgara lingvo tradukis Ivan H. Krestanoff Rek. de E. L. A.

Al poetoj. Kuraĝe vi povas uzi „virajn“ rimojn, tio estas rimoj kun la akcento sur la lasta silabo:

„Anjo de Taraŭ, pli kara ol *or'*
Mia vivsento vi, sango kaj *kor'*!“

Ni havas ja nian 16an regulon, kiu permesas la forigon de la „o“ ĉe substantivoj. Kelkaj poeziaĵoj bezonas la viglan fortan ritmon de la viraj rimfinoj, seninterrompa sekvo de virinaj finiĝoj ofte efikas enue. Krom tio oni per la apostrofo povas eviti tro oftan aperon de la litero „o“.

Lingva demando. La vorto „ŝtormo“ ne estas necesa. Ni uzu: uragano, ventego, forta vento, ili sufiĉos. Per *vento, venteto, facila vento, blovo, ekblovo, blovado* kaj *zefiro* ni havas la necesajn nuancojn.

Ne malofte venas al ni plendoj de kolegoj pri la nekorekta konduto de gazetredaktantoj. Ekzamenante tiajn plendojn, ni trovis, ke ili estas preskaŭ ĉiam pravaj. Efektive iaj redaktantoj trouzas siajn rajtojn kaj samtempe ne volas plenumi la necesajn postulojn de samideanismo. Plej gravaj estas la plendoj pri neresendo de neuzitaj manuskriptoj (eĉ malgraŭ antaŭa promeso) kaj pri arbitra ŝanĝo de senditaj tekstoj. Oni devas atenti, ke la kunlaborantoj de Esperanto-gazetoj ne ricevas ian mono-rekompencon por sia ofte tre pena laboro, kiun la gazetoj nepre bezonas por sia ekzisto.

La paperliveranto, la kompostanto, la presanto kaj (regule) la redaktanto estas pagataj por sia kunlaboro. Sed la liveranto de la teksto laboras pro nura idealismo. Krom siaj laboro kaj tempoperdo li havas konsiderindajn elspezojn (papero, inko, afranko), eĉ kelkfoje zorgon kaj ĉagrenon. Almenaŭ la laston li povus ŝpari, se la redaktanto ĉiam konus kaj sufiĉe plenumus siajn devojn.

Aliflanke ni konscias, ke ankaŭ la liveranto de manuskriptoj kelkfoje nenecese malfaciligas la laboron de l' redaktanto. Por resti objektivaj ni tial montros krom la rajtoj ankaŭ la devojn de la kunlaboranto por Esperanto-gazeto.

Por la bono de nia gazetaro estas necesaj vigleco kaj amikeco en la rilatoj inter gazetoj kaj verkantoj. Ili estas paralizataj, se arbitro, indiferenteco aŭ nekonsideremo al la rajtoj de aliuloj subfosas la reciprokan konfidon.

Niaj ĉisube publikigitaj devaro kaj rajtaro havas nur la karakteron de proponoj kaj konsiloj. Ni petas anojn de ambaŭ partioj sciigi al ni sian opinion.

La kunlaboranto de Esperanto-gazeto *Devas.*

1e. scipovi Esperanton minimume tiel, ke liaj tekstoj estas sen gravaj eraroj gramatikaj.

2e. Zorgi, ke lia intencita publikigo ne tuŝu la aŭtor- aŭ eldonrajtojn de aliulo.

3e. Eviti en siaj tekstoj ĉion, kio povas malutili al la Esperantoafero, kio estas kontraŭ honesteco kaj bonaj moroj aŭ kio ofendas iujn personojn, familiojn, gentojn aŭ religiojn.

4e. Uzi esperanton en formo ne kontraŭa al la fundamento.

5e. Skribi bone legeble; se li povas, per skribmaŝino, kaj sur nur unu flankon de ĉiu paperfolio.

6e. Numeri la paĝojn de sia manuskripto.

7e. Lasi liberan spacon por eventualaj korektoj.

8e. Sciigi, kio estu farata je lia manuskripto, se ĝi ne estas presota (konservi? forjeti? resendi? sendi al alia gazeto?).

9e. Almeti respondkuponon aŭ monon por la afranko de postulita pluensendo, se la gazeto estas eldonata en lando kun malpli bona valuto.

10e. Sufiĉe afranki sian sendaĵon kaj klare indiki siajn nomon kaj adreson.

Se li plenumas siajn devojn
kunlaboranto de Esperanto-gazeto *rajtas postuli.*

1e. Ke li estu iel (ekz. per poŝtkarto aŭ per noteto en la unua sekvanta gazetnumero) informata pri la alveno de sia manuskripto kaj pri la decido de la redaktanto, ĉu li akceptas la senditan tekston por publikigo aŭ ne.

2e. Ke en okazo de neakcepto lia manuskripto estu sendata laŭ lia peto al li aŭ al alia gazeto. (La afrankon antaŭpagu la kunlaboranto nur, se la gazeto aperas en lando malplibonvaluta.)

3e. Ke en okazo de akcepto-lia manuskripto aperu en la gazeto sen iuj aliigoj, escepte de korekto kaj sendubaj skribaj, gramatikaj aŭ faktaj eraroj.

4e. Ke la redaktanto, volante publikigi la senditan tekston en pli mallongigita aŭ iel alie ŝanĝita formo (escepte de la korektoj jus menciitaj), antaŭe demandu pri la permeso de la sendinto.

5e. Ke la redaktanto zorgu pri forigo de preseraroj en la publikigo.

6e. Ke oni sendu al li minimume du ekzemplerojn de la gazetnumero, en kiu aperas lia artikolo. (Se ĉi tiu estas tre malgranda proporcie al la amplekso de la gazeto, sufiĉas unu pruv-ekzemplero.)

7e. Aŭ almenaŭ esperi, ke li ricevos unu aŭ duonan jarkolekton de la gazeto senkoste, se li liveris multajn tre gravajn tekstojn.

⁂

El rusa lingvo tradukis s-ro Charles Rosen: „La Sonĝo de Makar“, Kristnaska rakonto de Vladimir Korolenko.

Aliĝis S-ro Charles Rosen, La Chaux-de-Fonds, Parc 107 bis, Svisujo.

Marie Hankel, Dresden, Nicolaistr. 18.

Rimarko de la Red.: Ĉar s-ino Hankel afable invitas opiniojn de ambaŭ flankoj, ni devas konfesi ke la multeco de la ricevitaĵoj tute malebligas sekvon de tiu ideala programo. Tio necesigus specialan oficiston kun aparta salajro, kio malfeliĉe ne estas nun ebla por tiu ĉi gazeto.

ESPERANTISMO

XIV. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN HELSINKI (Finnlando),

8—16 aŭgusto 1922.

Oka komunike.

Protektanto de la kongreso. La prezidanto de la Respubliko Finnlando akceptis la XIV Universalan Kongreson de Esperanto sub sian altan protekton.

La aliĝo. Rapidu aliĝi! Per tio vi faras grandegan servon al la kongreso. Kaj atentu: la aliĝkosto plialtiĝas de la unua de junio.

Alveturo kaj reveturo. Prezoj sur la ŝipo Rügen: Stettin—Helsinki I kl. 4000 Gmk, II 2800 Gmk; Helsinki—Stettin I 720 Fmk, II 720 Fmk.

Ekskursoj. La nova horaro de la marŝipoj al kaj el Finnlandaj havenoj estas en multaj rilatoj pli favora al la kongreso ol la antaŭa. Tiel i. a. je la vidpunkto de la ekskursoj.

Dum la kongreso okazos unutaga ekskurso al Borga, kun alveturo ŝipe kaj reveturo vagonare por duono de la partoprenantoj; la dua duono veturos inverse. Al la ekskurso estos verŝajne rezervata dimanĉo la 13 a de aŭgusto. Pri la kostoj estas malfacile doni ankoraŭ precizan informon. La ordinara veturprezo estas: vagonare II 17·25, III 11·50; ŝipe I 18·—, II 12·—.

Post la kongreso. Aludante al la ĝeneralaj notoj en la 1. § de la 5 a komuniko, ni donas novan horaron, akomoditan al la veturplano de la marŝipoj. Pro diversaj kaŭzoj, ni devas rezervi al ni rajton je iaj ŝanĝoj. Ni citas la ekskursojn komencante de la plej mallonga. Laŭ ricevita propono ni uzas la 24 horan dividon de la tago.

1. El Helsinki la 16. VIII je 21.32 vagonare al Viborgo. Vizito rapida de la urbo, veturo al Imatra kaj Vuoksenniska, de kie per vaporŝipo al Lappeenranta. Reveturo vagonare la 18. VIII je 23. 22. Alveno en Helsinki 19. III je 6. 55. al *Lübeck* kaj *Stockholm* je la 10a, al *Stettin* je la 12a, al *Kopenhago* 20. VIII je 10a. II 210 mk. III 145 mk.

2 a. Helsinki—Viipuri—Imatra kiel 1. Pli longa restado ĉe la akvofaloj kun vizito de Vallinkoski sub Imatra. El Vuoksenniska la 18an vespere ŝipe al Savonlinna. Vizito de la belega kastelo kaj de Punkaharju. Reveno aŭ vagonare kun halto en Viborgo aŭ ŝipe tra Lappeenranta. Al Helsinki 22. VIII je 21. 15. Elveturo sekvantan matenon por *Stokholmo* je 10a, por *Stettin* je 13a, por *Hull* je 19a. II 290-315 mk., III 200-225 mk.

2 b. Pli longa restade en Savonlinna, Punkaharju aŭ Viborgo. Al Turku-Abo la 24. VIII je 11. 45, elveturo por *Stokholmo* je 23. 45. II 315—340 mk, III 215—240 mk.

2 c. Simile kiel 2 b. Al Hango 24. VIII je 15. 99, elveturo por *Hull* je 15. 30. II 310—335 mk, III 210—235 mk.

3. Helsinki—Viborgo—Imatra—Savonlinna kiel 2. Rapida vizito de la urba kastelo kaj de Punkaharju; ŝipe al Joensuu, vagonare al Vuonislahti, motorboate al Koli. Reveturo vagonare al Viborgo—Helsinki aŭ Turku aŭ Hango, forveturo kiel 2 a, b aŭ c. II 490—515 mk, III 355—370 mk.

4. Helsinki—Viborgo—Imatra—Savonlinna—Punkaharju kiel 2, kun sufiĉa tempo por ĉiuj vidindajoj. Ŝipveturo al Kuopio, vagonare al Kajaani, ŝipe al Vaala, per glitboato laŭ la akvofaloj al Oulu. El Oulu 25. VIII meztage per vagonaro al Turku (26. VIII je 11. 45; el Turku por *Stokholmo* je 23. 45) aŭ al Helsinki (26. VIII je 11. 00; el Helsinki por *Stettin* je 12.00). II 630 mk, III 460 mk.

5. Helsinki—Viborgo—Imatra—Savonlinna—Punkaharju—Koli kiel 3, sed kun sufiĉa tempo por la vidindajoj. De Koli al Valamo. De tie fervoje tra Viborgo al Helsinki kaj Turku, atingante la samajn ŝipojn kiel en 4, kaj krom tio ankaŭ la ŝipojn, kiuj elveturas el Helsinki la 26. VIII je la 10 a por *Lübeck* kaj *Stokholmo*. II 540—565 mk, III 390—415 mk.

6. Helsinki—Viborgo—Imatra—Savonlinna—Punkaharju—Koli kiel 5. De Koli reveturo ŝipe al Savonlinna kaj daŭrigo laŭ 4 al Kuopio—Kajaani—Vaala—Oulu. Reveturo al Helsinki, 29. VIII je 11.00. El Helsinki 30. VIII por *Kopenhagen* kaj *Stokholm* je 10a, por *Stettin* je 13a, por *Hull* je 19a. II 820, III 630 mk.

Kongresa banko. Pro diversaj kaŭzoj ni devis ŝanĝi la kongresan bankon. Nia banko de nun estas *Luottopankki Oy.* — Ni atentigas ankoraŭfoje, ke estas plej profite sendi la aliĝojn kaj deponojn al la LKK, per bankĉeko en via nacia mono, pagota en vialanda ĉefurbo laŭ la ordono de la LKK. Tiajn ĉekojn ni povas monigi je plej favora kurzo.

Pasportaj aferoj. La vizo al Finnlando kostas, sendepende de la nacieco aŭ deveno de la petanto, en *Tallinn* 375 Emk, *Skandinavio* 7 Kr, *Berlin* 50 Gmk, *Varsovio* 7500 Pmk, *Zürich* 10 Fr, *Paris* 20 Fr, *London* 10/—, *Usono* 10 $.

Aliĝoj. Aliĝis ĝis nun 308 personoj el 23 landoj laŭ jena statistiko: Germanio 35, Britlando 31, Estonio 27, Pollando 25, Nederlando 19, Aŭstrio 15, Franclando 13, Ĉekoslovakio 11, Italio 6, Hungario 5, Litovio 4, Svislando, Danlando, Latvio po 3, Rumanio 2, Svedlando, Hispanio, Usono, Turkio, Kanado, Japanlando kaj Venezuela po 1. Finnlando 99.

Plie aliĝis 25 helpkongresanoj.

Financoj. La L. K. K. ricevis por la Garantia Kapitalo 15.500 Fmk, por la Blindula Kaso 660,14 Fmk, kiel donacoj 69.666,08 Fmk. En tiu sumo estas 50.000 Fmk subvencio de la Ŝtato kaj 10.000 Fmk, subvencio de la urbo Helsinki.

La Loka Kongresa Komitato.

Adreso: Poŝta (ankaŭ por monsendoj): XIV. kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando. Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

Fervojista kongreso dum la XIV. en Helsinki

La preparoj por tiu ĉi kongreso akceliĝis nun tiel ke oni elektis provizoran lokan komitaton, al kiu apartenas librotenisto S. Veijola, vagonarekspedisto T. Nikolainen (ambaŭ loĝantaj en Helsinki, adreso Helsingin asema) kaj la subskribinto. Oni vizitis ĉefdirektoron de la fervoja administracio, s-ron B. Vuolle, kiu tre afable akceptis la vizitantojn kaj volonte permesis monkolektadon por la kongreso inter Finnlandaj fervojistoj. Li tre simpatie parolis pri Esperanto kaj petis nin kolekti statistikon pri niaj fervojistoj, kiuj ĝin studas. Fine li admonis nin sendi petskribon pri subvencio al la fervoja administracio kaj eĉ promesis, se eble, fordoni litvagonon kiel loĝejon por eksterlandaj fervojistoj.

Kvankam la nombro de Finnlandaj *esperantistaj* fervojistoj verŝajne ne estas granda, ni tamen kuraĝas esperi bonan sukceson kaj petas kolegojn amase sin anonci al la faka kongreso. Aliĝojn akceptas s-ro S. Veijola kaj la subskribinto.

Admoncirkulero estas jam sendita al ĉiuj stacioj en nia lando.

Ni petas, ke ankaŭ ĉiuj aliaj gazetoj Esperantaj enpresu ĉi tion.

Por la loka esperantista fervojista komitato:

H. Salokannel,
librotenisto, stacio Laihia, Finnlando.

KRONIKO.

Aŭstrio.

Oni intencas inviti la XVIan Internacian Kongreson de Esperanto en Wien (1924). Fondiĝis Aŭstria Laborista Ligo kies konferenco (35 personoj) okazis la 25—26 Marto en Linz. Adreso: Humboldtstrasse 46, Linz.

Belgio.

La 17—20 Aprilo okazis en Bruxelles la Ia Kongreso de Internacia Federacio de Arto, Beletristiko kaj Scienco. Prezidis Han Ryner. S-ro E. Lanty, redaktoro de „Sennacieca Revuo“ ĉeestis la kongreson kaj sukcesis voĉdonigi unuvoĉe rezolucion tre favoran al Esperanto: „La Kongreso rekomendas la studon de Esperanto al ĉiuj membroj de FALS kaj ĝian uzon en internaciaj rilatoj; ĝi komisias la rajtigitajn reprezentantojn de FALS fari ĉiujn utilajn klopodojn por ke la registaroj enkonduku en ĉiujn lernejojn la studon de lingvo kiel esperanto, petas insiste ĉiujn membrojn uzi ĉiuokaze ilian personan influon por faciligi la propagandon de internacia lingvo.“

Britlando.

La jara kunveno de la Nord-Orienta Federacio okazis en Newcastle. Ĉeestis 30 personoj. Prezidis S-ino S. E. Wright.

Bulgario.

La Societo de publicistoj kaj ĵurnalistoj en Sofia akceptis favoran rezolucion post parolado de S-ro At. D. Atanasov. — En Kirĝali festo esperanta donis profiton de 3750 levoj kies duono estos dediĉata por helpo al la malsatuloj en Rusio.

Ĉeĥoslovakio.

Preparoj por la 1. kongreso ĉeĥoslovaka en Brno la 10—11 Junio bone progresas. F-ino Šupichová faris plurajn paroladojn pri la Konferenco „Esperanto en Lernejoj“. La 30. Aprilo okazis en Olomouc kunveno de nordmoraviaj esperantistoj. La 7 Majo okazis 2. laborkunsido de okcidentbohemaj esp-istoj en Plzeň. La 14 Majo la Deka kunveno de orienta regiono en Jaroměř. En aprilo 110 gazetoj publikigis sciigojn pri progreso de Esperanto.

Danlando.

Ekspozicio okazis en la Lerneja Muzeo de Kopenhagen. La inspektoro, S-ro Christensen deziras praktike uzi Esperanton en la servo de la Muzeo. Eksterlandaj instruistoj bonvolu rilati pri lerneja materialo kaj novaj sistemoj de instruado. 33 Ruĝkrucanoj lernas Esperanton post parolado de S-ro C. A. Hvorslev en Aarhus.

Estonio.

La unua kongreso de estonaj esperantistoj okazis la 2. Aprilo. Ĉeestis 82 personoj. La ministro de Instruado kaj la Centra Lerneja Ligo por Junuloj sendis saluttelegramon. La manko de loko ne ebligas al ni raporti pri la interesaj raportoj laŭ kiuj la movado estas tre vigla malgraŭ la manko de lernolibroj. La rezolucioj de la kongreso estos prezentataj al la ministro por eksterlandaj aferoj kun peto akceli la oficialigon de Esp. ĉe la Ligo de Nacioj.

Finnlando.

La XIV. kongreso ricevis 50.000 Fmk. subvencion de la Registaro kaj 10.000 Fmk. de la urbo Helsinki. La Esperanto-Asocio ricevis ŝtatan subtenon sub formo de senpagaj biletoj sur la finnaj fervojoj. La Asocio povas de nun aranĝi de longe deziratan formon de propagando: ĝi povas sendi paroladiston-kursgvidanton al ĉiuj partoj de la lando. La 8a kongreso Finnlanda okazis la 25—26 marto. Oni konstatis grandajn progresojn faritajn dum la lasta jaro.

Francio.

La Kongreso en Béziers ne okazos. Ĝenerala kunsido de S. F. p. E. estos organizata en alia urbo. L'„Union Commerciale et Industrielle“ en Le Creusot oficiale rekomendas al la komercistoj aliĝi al la tiea esperanta grupo, kaj helpi ĝin pri komercaj rilatoj kun eksterlando. Framasonaj loĝioj „Thélème“ kaj „Clémente Amitié“ en Paris voĉdonis favorajn deziresprimojn dank' al S-roj Méras kaj Eyquem. Du kursoj por Ĉinoj, gvidataj de S-ro Thévenet okazas en Lyon. Sukcesa festo propaganda kun pli ol 1000 ĉeestantoj estis organizita de la Laborista Grupo de Lyon. La „Amikaro Esperantista“ (6, rue Childebert) organizas komercan kurson de Esperanto en la urba lernejo por ekstera komerco 60 p. La grupo sukcesis enkonduki Esperanton ĉe la Informa Oficejo de la Foiro de Lyon (27, r. Gentil) laŭ lasttempa komuniko de S-ro F. Drudin. La dua kongreso de franclingvaj revoluciemaj esperantistoj okazos en Troyes (Aube) la 4—5 junio. Adreso: S-ro René Cap, 32, rue aux Moines.

Germanio.

La eldonejoj Ader & Borel kaj Friedrich Ellersiek kunfandiĝis post eksiĝo de S-ro Ader. La nova firmo nomiĝas nun Ellersiek & Borel. La direktoro estas S-ro Ellersiek. Adreso: Struvestr. 40. Dresden A. I. Distrikta kunveno de la Germana Laborista Esperanta Asocio okazis la 11—12 Marto en München. Konata scienculo D-ro K. Jellinek el Danzig aludas pri Esperanto en scienca verko: Das Wetengeheimnis. Okazis interesa esperanta infanfesto en Freital (Saksio) 500 infanoj ĉeestis. Esperanto estas devige instruata en ĉiuj du lastaj jarklasoj de la kunigitaj vilaĝoj Niederhermsdorf kaj Wurgwitz.

Hispanio.

La aŭstriaj infanoj gastigataj en Hispanio hejmeniris akompanitaj de D-ro Josep Casanova, del. UEA en Girona. Granda ekspozicio de esperantaĵoj kaj parolado de S-ro Garzon Ruiz okazis en Jerez.

Hungario.

Landa Esperanta Kongreso organizota de la grupo „Harmonio“ baldaŭ okazos en Miskolc. S-ro Abato Ĉe reirante al Rumanio faris paroladon en Budapest pri la Ĝeneva Konferenco. Preskaŭ ĉiuj hungaraj gazetoj raportis pri la Konferenco. La laborista Societo en Budapest aranĝas 21 kursojn kaj havas proksimume 500 membrojn.

Italio.

Multaj paroladoj, kunvenoj, kursoj, gazetartikoloj inter alie en: Roma, Sampierdarena, Genova, Savona, Camogli, Trani, Bologna, Napoli, Caserta, Firenze. Kursoj por instruistoj okazas en Bologna, Sampierdarena (42 p). Kursoj en popolaj lernejoj estas organizataj en Cremona, Bologna, Trieste. En ĉi tiu lasta urbo oni preparas la VII. Kongreson de italaj esperantistoj (20—22 septembro), la aŭtoritatoj sin montras tre favoraj.

Nederlando.

La ĝenerala kunveno de la LEEN okazos en Hago la 16an de Julio. Okazos ekskurso en Wassenaar.

Pollando.

Kursoj, paroladoj, gazetartikoloj en pli ol 16 urboj.

Ruslando.

Esperantista oficejo de Poŝtistoj eldonis 5000 ekzemplerojn de esp.- rusa vortaro. Kursoj en Krasnodar, Novorossisk, Ostrov, k. t. p.

Svedlando.

Ok gazetoj presis kurson de Esperanto verkitan de S-ro H. Skog en Ystad. La Sveda Federacio havis jarkunvenon Paske en Malmö. Okazis ekskurso al Kopenhagen.

Svislando.

La movado reorganiziĝis en Burgdorf dank' al la malavara kaj vigla propapando de S-ro Max Schafroth. Estis elektitaj P: S-ro Schär, S: F-ino Schütz. La grupo „Stelo“ en Genève kolektis 24 fr. por sendo de nutraĵoj al S^{to} de esperantistaj inĝenieroj en Petrograd. Dum la ĵurnalista tago en la Foiro de Basel oni prezentis salutojn en germana, franca, itala kaj romanĉa lingvoj. D-ro Unger el Zurich siavice parolis en Esperanto. La 23. aprilo okazis en Basel Esperanta Tago kun propagandaj paroladoj de S-roj Schmid, Uhlmann, Unger, Sevenhuijsen. La Svisa Specimena Foiro (Gerberstr. 30, Basel) korespondas en Esperanto. La 5 kaj 6 Majo en Zürich kaj St Gallen S-roj Seche kaj Dietterle el Leipzig faris propagandajn paroladojn, kiuj tre sukcesis.

Ameriko.

La unuan fojon Esperanto estis propagandita en Newfoundland (Tero Nova) de pastro R. E. Fairbairn per parolado en la Metodista Literatura Instituto de urbo St. John. En Montevideo S-ro Enrique Legrand instruas 30— 40 membrinojn de la Ruĝkruca organizaĵo.

Aŭstralio.

La movado progresas en Melbourne dank' al la paroladoj de S-roj J. G. Pyke kaj R. R. Rawson, antaŭnelonge revenintaj el Praha, post treege sukcesplena mondvojaĝo. Gravaj tagjurnaloj presigis longajn intervjuojn. Ambaŭ vojaĝintoj ne povas sufiĉe danki la sindonajn delegitojn de UEA kaj multajn aliajn samideanojn kiuj tiel kore faciligis ilian longan vojaĝon.

Azio.

Koresponda kurso organiziĝis en Ĉe-Kian (Ĉinio). La grupo de Kanton restariĝis. En Shanghai la nacia grupo „Dek homoj“ malfermis kurson (50 p.). Vasili Eroŝenko, blinda samideano instruas en la universitato de Peking, kie ekzistas esperanta kurso jam de 5 jaroj. En Japanio S-ro Ga multe propagandas; parolado en Tokio (800 lernantoj de liceo), en Kanazaŭa (600 p.), propagando en Shizuoka de S-roj Takahaŝi, Kuroita, Ramstedt k. t. p. Ĉie estas granda intereso pri Esperanto.

Movado en Azio

Letero el Tokio

de *M. Ga*, Del. de UEA, Tokio.

La 3an Decembro 1921. Dank' al fervora klopodo de S-ro K. Takahaŝi, del. de UEA, japana pioniro de Esp., en la provinc-urbo Ŝiznoka oni aranĝis priesperantan paroladon en la nomo de urba kaj provinca asocioj por instruado. La parolado, kiun faris S-roj Takahaŝi, Ga, D-roj Kuroita, Ramstedt, komencis je la 7a kaj finis je la 11a horo kaj havis ĉirkaŭ 800 aŭskultantoj, inter kiuj sin trovis provincestro, urbestro k. t. p.

Antaŭ la parolado, oni aranĝis por ni, alveturintoj (D-roj Kuroita „Pioniro de Esp.“, „partopreninto al la kvara Kongreso en Dresden“, Ramstedt kaj mi), la bonvenigan vespermanĝon, kiun preskaŭ tuta urba eminentularo (provincestro, urbestro, gimnazestroj, policestro, eĉ tiea regimentestro) partoprenis, la Provincestro faris bonvenigan saluton kaj D-ro R. respondis Esperante (vidu Januaran numeron de „Revuo Orienta“).

La 15an Decembro laŭ la peto de la estro de la IIIa liceo en Tokio mi faris dum-2-hora priesp. paroladon antaŭ 2.800 lernantoj en la liceo. 26 instruistoj (kune la estro mem) nun fervore memlernadas Esp. interhelpante, por kiuj ankaŭ unufoje la 25an Decembro mi faris koncizan klarigon pri Esp. gramatiko dum 2 horoj.

S-ro Kunio Janagida, unu el Japanaj delegitoj ĉe L. de N. en Ĝenevo, kiun eble vi mem persone konas, en Januaro el Genève reveninte, alportis la petskribon pri Esp. al Japana parlamento ĵus nun kunsidanta havantan subskribojn de Japanoj restadintaj en Ĝenevo. La petskribo estis jam prezentita al la parlamento sed pro ĝia eksterformaleco ne akceptita. Instigite de ĉi tiu fakto, ni E-istoj en Tokio kunvenis vespere de la 25a Januaro kaj sub mia prezidanteco oni diskutis la tekston de la nove prezentota petskribo al la parlamento kaj decidis. Entute 140 subskriboj (precipe nur en Tokio, pro manko de tempo) kiuj enhavas universitatprofesorojn, kaj aliajn eminentulojn, estis kolektitaj por la petskribo, kiu jam la 3an Februaron estis prezentita al la ambaŭ ĉambroj de la nun kunsidanta parlamento pere de eminentaj membroj de P. (laŭ mia peto). La petskribo certe estos akceptata de la ambaŭ ĉambroj (mi antaŭvidas). Ŝajne la akcepto de la peto senpere preskaŭ neniom havus praktikan rezulton, sed ĝi vere estus tre efika konvinkilo por la oficiala rondo ĉitiea kaj taŭgus kiel preparo por estonta pli grava klopodo nia.

Rilate al ĉitiu afero mi mem ne povas min deteni esprimi mian koran dankon al la profunda simpatio por nia afero de S-ro Soroku Ebara, membro de nobelara ĉambro de P. (li mem ne estas nobelo), fama pioniro de kristanismo en Japanujo, jam 83 jaraĝa, kiu volonte unue prenis sur sin perantecon de la petskribo laŭ mia peto.

Mi intence unue petis ĉitiun maljunan kleran sinjoron, ĉar se eĉ tia maljuna sinjoro esprimos sian simpation por tia moderna afero kiel Esp., ceteraj sinjoroj tre facile povus inklini al ni.

Korekto de erarskribo en Esperanto

Mi ĝojas ke vi priskribis en la gazeto „Esperanto“ pri la parolado aranĝita de urbestro. de Tokio. Tamen estas tre stranga eraro kaj tro vana honorigo por mi ke vi skribis (Esp. Finnlando ankaŭ) min kiel *bofilon de iu grafo, eksministro.* Mi tute nek estas bofilo de iu grafo aŭ iu eksministro, nek apartenas al nobelaro, sed nur tute privata homo (dankinde aŭ bedaŭrinde!). Antaŭ unu jaro en la letero aperigita en F. E. (Oktobra numero 1920.) D-ro Ramstedt skribis min kvazaŭ esti iu familiano *Grafa* kaj de tiam oni nomas min ŝerce *Finnlanda Grafo.* Nun la aŭtentika gazeto „Esperanto“ honoras min kiel *Grafido* kaj ŝercemulo volas reealdoni al mi la tro honorindan titlon *Svisa Grafo.* Ĉu eĉ en Esperantujo oni povas krei nobeltitlon? Ĉiuokaze mi ankoraŭ ne meritas tian honoron, bonvolu repreni ĝin kaj prefere transdonu ĝin al iu riĉega fraŭlino en iu riĉega lando, kiu ĝenerale onidire tre ŝatas nobeltitolon.

De kie la eraro devenas? Nur mi scias ke mia deinfaneca intima *amiko S-ro Okabe,* kiesnomon D-ro R. ankaŭ skribis en sia letero, estas la *filo de Grafo Okabe* kaj *bofilo de eksministro Kato* kun S-ro Okabe intermiksi min estas tre stranga.

Dokumentoj

Sekve de petskribo adresita de la komitato de Esp. organizaĵoj en Ĉita kaj de 32 deputitoj aŭ verkistoj la Registaro publikigis jenan decidon:

Malproksim-Orienta Respubliko
Ministerio
por Popola Klerigo

Cirkulero N 16

La 17an de Februaro 1922.

Al ĉiuj oficejoj por Popola Klerigo kaj al Centra Lerneja Administro de Ministerio de Transporto.

La provizora Centra Komitato de Esperantistaj Organizajoj turnis sin al Ministerio por Popola Klerigo kun propono pri popularigo de la ideo de lingvo internacia kaj pri enkonduko de la lingvo Esperanto en oficialajn programojn de Unueca Lernejo de Malproksim-Orienta Respubliko. Kiel praktikajn formojn por kunhelpo de Ministerio en la montritaj rilatoj la Provizora Centra Komitato proponas:

1. Rajtegaligon de la lingvo Esperanto kun la fremdaj lingvoj en rilato al la lerneja instruado.
2. Starigon de katedro de la lingvo Esperanto ĉe la ekzistantaj pedagogiaj institucioj por pretigi konforman instruistaron.
3. Akcepton de Esperantistaj organizaĵoj de Malproksim-Orienta Respubliko sub la gvideco de l'Ministerio kaj kunhelpon al ili en la afero de disvastigado kaj popularigado de la lingvo Esperanto.
4. Starigon de Esperanto-Sekcio ĉe unu el la Ministeriaj fakoj por realigi la konformajn agojn, akcelantajn la sukceson de l'esperantismo kaj por gvidi la lernejan instruadon de Esperanto.

Konfesante en la celado popularigi la internacian lingvon Esperanto certan kulture-edukecan valoron Ministerio por Popola Klerigo, konsiderante la ekstreman malsufiĉon de la monrimedoj, prezentitaj por la afero de popola klerigado, ne trovas ebla en nuna momento plene kontentigi la proponon de la esperantistoj.

Se tamen troviĝos sufiĉaj monsumoj por tiu-ĉi celo en lokaj privataj fontoj, Ministerio rekomendas efektivigadi la rimedojn kondukantajn al popularigo de la lingvo Esperanto kaj al ĝia instruado en la lernejoj de Malproksim-Orienta Respubliko, kiel lernfako nedeviga.

Subskribis:

Vic-ministro *Maliŝev.* Fakestro de sociala edukado *V. Riĥter.*
Sekretario *Arsenjev.*

La demando pri Ĝenerala Organizo

S-ro *Page*, Edinburgh, Prezidanto de la Komisiono pri Ĝenerala Organizo petas in sciigi al la esperantistaro, ke pro diversaj kialoj, kaj precipe pro la bedaŭrata malsano de S-ro Stettler (kiu entreprenis verki en la Komisiono projekton de statuto, konformiĝinta al la plano de organizo aprobita de la 13a Kongreso), ne estas eble prezenti al la Kongreso en Helsinki statuton kaj financan planon plene konsentitan de ECO kaj UEA aŭ eĉ de la Komisionanoj mem.

S-ro Page mem devis verki projekton de statuto, kiun ni presigas sube. Li submetis ĝin al la Komisionanoj, sed ne estas facile diskuti ĝin detale per korespondado kaj la ĉeestantaj komisionanoj diskutos ĝin en la komenco de la Kongreso en Helsinki. S-ro Page tre deziras, ke la statuto estu akceptita de la Kongreso, por ke la organiza demando povu malaperi de la tagordoj de niaj kongresoj, kaj li intencas proponi ke la kongreso akceptu ĝin, kaj rekomendu ĝian akcepton al ECO kaj UEA provizore, ke post iom da sperto oni povos alĝustigi ĝin al la trovotaj bezonoj per postaj amendoj. Pri la financa flanko li pensas, ke se la Ligo estas starigata, alvoko al la esperantistaro por granda sumo por certigi la solidan ekfunkciadon de la Ligo ricevos tujan favoran respondon de la bonvolaj esperantistoj.

Projekto de Statuto de la Universala Ligo Esperantista

I. — Celoj.

1. — Sub la nomo *Universala Ligo Esperantista,* nomata en ĉi tiu Statuto „La Ligo“, ekzistas asocio, kiu celas:

a) disvastigi la internacian lingvon Esperanto, per ĉiuj rimedoj;

b) starigi konstantan kason por la subtenado de la Esperanta Lingva Komitato kaj Akademio;

c) starigi konstantan kason en diversaj landoj por faciligi poresperantajn kaj peresperantajn internaciajn interrilatojn kaj servojn, kaj precipe daŭrigi kaj disvolvigi la laboron ĝis nun faritan de Esperantista Centra Oficejo kaj Universala Esperanto Asocio;

ĉ) organizi bibliotekon kaj klasigi kaj konservi arkivojn kaj statistikojn de Esperanto;

d) eldoni oficialan gazeton, kaj bultenojn, librojn, broŝurojn, kaj aliajn propagandilojn;

e) plifaciligi ĉiuspecajn intelektajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio, aŭ lingvo;

f) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj;

g) reprezenti la esperantan movadon ĉe registaroj, kaj publikaj, naciaj, kaj internaciaj institucioj;

ĝ) kaj, ĝenerale, fari ĉion kompetentan kaj laŭleĝan, kio iel povas akceli la diritajn celojn aŭ iujn el ili.

II. — Neŭtraleco.

2. — La Ligo estas neŭtrala rilate al religio, nacieco kaj politiko. En ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj al ĉiuj oficoj.

III. — Oficiala lingvo.

3. — La oficiala lingvo de la Ligo estas la Zamenhofa Lingvo Esperanto, difinita per la Fundamento de Esperanto, sia literaturo kaj sia teknika verkaro, kaj kontrolata en sia evoluo de la Esperanta Lingva Komitato.

IV. — Jura Sidejo.

4. — La jura sidejo de la Ligo estas en la urbo elektita de la Ĝenerala Komitato.

V. — Organizo.

La Membraro de la Ligo konsistas el:

1. Personoj („Liganoj“), kaj

2. Societoj, lokaj, naciaj, fakaj, k. t. p.

La ĝenerala gvidado kaj administrado de la Ligo estas farata de la Ĝenerala Komitato.

La celoj de la Ligo estas efektivigataj pere de Fakaj Komitatoj.

La Fakaj Komitatoj de la Ligo konsistas el du ĉefaj komitatoj:

1. Propaganda Komitato, kaj

2. Servada Komitato.

La Ĝererala Komitato rajtas starigi pluajn komitatojn laŭbezone.

Al la Ligo povos aliĝi Aprobantoj, t. e. neesperantistaj organizajoj kaj personoj, kiuj morale kaj finance subtenas Esperanton. Ili ne havas rajton voĉdoni.

VI. — Personaj membroj.

Rajtas esti Ligano „ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanton, tute egale por kiaj celoj tiu ĝin uzas“, kaj kiu havas honorindan karakteron, pagas la kotizon, kaj plenumas la postulitajn kondiĉojn. Tamen la Ĝenerala Komitato rajtas rifuzi elekton de persono, kiun ĝi malaprobas, ne donante motivon.

Dumviva Ligano estas membro, kiu pagas unufoje por ĉiam kotizon kaj abonon fiksotajn de la Ĝenerala Komitato.

Rajtoj de Liganoj:

Liganoj rajtas elekti delegiton kaj vic-delegiton; voĉdoni en la kunveno de sia loko; ricevi membrokarton kaj jarlibron; kaj uzi la ĝeneralajn servojn de la Ligo.

Aldone al tio, ili rajtas ricevi la *Oficialan Gazeton*, se ili abonas ĝin.

Honoraj membroj estas personoj, kiujn, pro gravaj servoj aŭ donacoj faritaj al la Ligo, la Ĝenerala Komitato distingas per tiu titolo. Ili ne pagas kotizon, kaj ne rajtas voĉdoni. Ili ricevas la dokumentojn, kiujn decidas sendi la Ĝenerala Komitato.

VII. — Societo-membroj.

Ĉiu loka, nacia, aŭ faka Esperantista Societo, kies regularo akordiĝas kun ĉi tiu statuto, kaj kiu pagas ta postulitan kotizojn rajtas aliĝi al la Ligo, kiel societo-membro.

Ĝi pagas kotizon fiksotan de la Ĝenerala Komitato, kaj almenaŭ po unu svisa franko por ĉiu deko de ĝiaj membroj, sed la minimuma kotizo de ĉiu societo estas 10 svisaj frankoj.

Ĝi rajtas partopreni en la elekto de reprezentantoj de societoj en la Ĝenerala Komitato, kaj ricevi la *Oficialan Gazeton.*

VIII. — Lingva Komitato kaj Akademio.

Funkcias apud la Ligo la Lingva Komitato kaj Akademio.

La Lingva Komitato estas rigardata kiel aŭtonomia oficiala institucio kreita de la Esperantistaro.

La Ĝenerala Komitato rajtas nomi al la Akademio kandidatojn por la Lingva Komitato en la okazo de elekto de novaj membroj.

IX. — Delegitoj.

En ĉiu loko, grava pro sia grando, la Ligo klopodas elektigi Delegiton kaj Vic-Delegiton.

La Delegito reprezentas la Ligon en sia loko, kaj reprezentas, ĉe la Ligo, la lokajn Liganojn.

La Ĝenerala Komitato starigos regularon, kiu difinos la manieron de elekto, la funkciojn, kompetentecojn, kaj devojn de la Delegito.

X. — Ĝenerala Komitato.

La Ĝenerala Komitato (Ĝ. K.) konsistas el:

1. Ses anoj elektitaj de la ligaroj pere de la Delegitoj, por tri jaroj, po du komitatanoj ĉiujare. Por elekti ĝeneralan komitatanon Delegito havas tiom da voĉoj, kiom da membroj li reprezentas en sia loko;

2. Ses anoj elektitaj de la societo-membroj, por tri jaroj, po du komitatanoj ĉiujare; kaj

3. Tri anoj elektitaj ĉiujare de la Kongreso.

La tuta regado de la Ligo apartenas al la Ĝenerala Komitato, kiu, krom la rajtoj difinitaj de ĉi tiu Statuto, havas la rajton fari ĉion, kio povas esti farata de la Ligo kaj ne estas malpermesata de rezolucio de la Ligo post ĝenerala voĉdono.

La Ĝenerala Komitato kunvenas laŭbezone kaj nepre unufoje ĉiujare dum la Internacia Kongreso de Esperanto. La kongresanoj rajtas ĉeesti la kunvenojn de la Ĝenerala Komitato, sed ne rajtas voĉdoni.

La Ĝenerala Komitato enspezas kotizojn, abonojn, kaj donacojn; starigas kason, kaj dispartigas la sumojn bezonatajn por la ĝenerala agado de la Ligo, por la subteno de la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj por la *Oficiala Gazeto*, kaj por la funkcigo de la Fakaj Komitatoj.

La Ĝenerala Komitato elektas ĉiujare el siaj membroj la Prezidanton kaj la Vic-Prezidanton de la Ligo. Ĝi ankaŭ elektas laŭbezone kaj ne necese el sia anaro, la Ĝeneralan Sekretarion, Ĝeneralan Kasiston, kaj la honorajn membrojn. Ĝi rajtas elekti patronojn, kaj honorajn prezidanton kaj vic-prezidantojn.

Ĝi fiksas la ĝeneralan agadon de la Ligo laŭ tiu ĉi Statuto kaj la deziresprimoj de la Kongreso.

Privoĉdonas la jaran raporton kaj kontrolas la administradon de la kapitalo de la Ligo.

Decidas pri apeloj, kaj pri la aliaj aferoj al ĝi rezervitaj.

La Prezidanto reprezentas la Ligon en ĉiuj eksteraj, ne pure administraj rilatoj, kaj subskribas kun la Ĝenerala Sekretario ĉiujn gravajn dokumentojn. Li prezidas la Ĝeneralan Komitaton. Persone aŭ ilin transdonante al alia Komitatano, li prizorgas la aliajn taskojn al li destinitajn per ĉi tiu Statuto. En gravaj kaj urĝaj okazoj li havas la kompetentecojn de la Ĝenerala Komitato, al kiu li raportas kiel eble plej baldaŭ. Vic-Prezidanto helpas kaj anstataŭas lin.

XI. — Direktanta Komitato.

La Direktanta Komitato (D. K.) konsistas el la Prezidanto kaj du Vic-Prezidantoj de la Ligo kaj Prezidantoj de la Propaganda kaj Servada Komitatoj.

La Ĝenerala Komitato rajtas komisii al la Direktanta Komitato ĉiujn aferojn en sia kompetenteco.

La Direktanta Komitato agas konforme al la instrukcioj de la Ĝenerala Komitato pri ĉiuj aferoj komisiitaj al ĝi de la Ĝenerala Komitato aŭ per ĉi tiu statuto; kontrolas la Administrejon kaj Redaktejon, administras la kapitalon de la Ligo, elektas redaktorojn kaj aliajn oficistojn kaj fiksas ilian salajron, kaj ĝenerale prizorgas la aferojn de la Ligo.

XII. — Proponoj.

Ĉe elekto de la Ĝenerala Komitato, tri monatojn antaŭ la elekto, la Direktanta Komitato fiksas la daton por la ricevo de propono de kandidatoj kaj publikigas ĝin en la *Oficiala Gazeto*. Du liganoj, aŭ societo-membroj, rajtas proponi kandidaton, kaj en la proponilo donas la detalajn informojn pri la kandidato, postulajn de la Direktanta Komitato.

La nomoj de la kandidatoj estas publikigataj en la *Oficiala Gazeto* almenaŭ unu monaton antaŭ la voĉdonado.

XIII. — Voĉdonoj.

Ĝenerala voĉdonado de la Ligo estas farata per la voĉo de la liganoj kaj societo-membroj.

La liganoj voĉdonas pere de sia loka Delegito, kiu havas tiom da voĉoj, kiom da liganoj li reprezentas.

Kiam estas okazonta ĝenerala voĉdonado pri grava afero, estas rekomendate, ke Delegito alvoku siajn liganojn kaj poste voĉdonu laŭ ilia deziresprimo.

Ĉiu societo havas tiom da voĉoj, kiom da ĝis centoj da membroj havas tiu societo.

Ĝenerala voĉdonado okazas:

Se la Ĝenerala Komitato ĝin okazigas;

Se dudek delegitoj aŭ societoj skribe postulas ĝin. La Direktanta Komitato ĝin aranĝas ne pli ol tri monatojn post ricevo de la postulo.

Ĝenerala voĉdonado povas nuligi ĉiujn antaŭajn elektojn kaj decidojn, ŝanĝi la Statuton, aŭ dissolvi la Ligon.

Kutime dum oktobro-novembro la Direktanta Komitato okazigas ĝeneralan voĉdonadon:

por elekti la anojn bezonatajn por la Ĝenerala Komitato;

por decidi pri ia proponita ŝanĝo de la Statuto;

por aliaj aferoj, laŭ decido de la Direktanta Komitato aŭ la iniciativo de la liganoj aŭ societoj.

Ĉiun aferon submetotan al ĝenerala voĉdonado publikigas la Direktanta Komitato en la *Oficiala Gazeto* almenaŭ unu monaton antaŭ la tempolimo por la voĉdonado.

Por la rezulto valoras la plimulto de ĉiuj voĉoj.

La voĉojn kontrolas la Direktanta Komitato. La Ĝenerala Sekretario certigas la korektecon de la procedo.

XIV. — Organizo de komitatoj.

La Ĝenerala Komitato, kaj Direktanta Komitato, kaj ĉiu Faka Komitato rajtas fari regularon necesan por sia interna funkciado. Ĉiu Faka Komitato devas submeti sian regularon aŭ amendon de regularo al la Direktanta Komitato por aprobo, antaŭ ol tiu regularo aŭ amendo fariĝos definitiva. Ricevinte novan regularon aŭ amendon de regularo, la Direktanta Komitato publikigas ĝin en la *Oficiala Gazeto*; kaj, se neniu kontraŭstaras, ĝi fariĝas definitiva post tri monatoj de la dato de tiu publikigo. Ĝis kiam alia regularo estos alprenita, la estanta regularo de la diversaj jam ekzistantaj fakoj aplikiĝas, krom en la okazo se ili malakordas kun ĉi tiu Statuto.

Ĉiuj komitatoj de la Ligo laboras per rondiranta kajero aŭ per cirkuleroj. Ili kunvenas ĉiujare je la tempo de la Kongreso, la Direktanta Komitato se eble pli ofte. Ĉe kunvenoj, demandoj estas decidataj de la plimulto de voĉoj de anoj ĉeestantaj aŭ reprezentataj de rajtigitaj anstataŭuloj. En okazo de voĉegaleco decidas la prezidanto de la kunveno.

Ĉiu komitato rajtas submeti demandon al siaj anoj por poŝta baloto, kaj difini templimon por respondo. En tiu okazo la sekretario de la komitato sendas la demandon al ĝiaj anoj, laŭ la formo aprobita de la komitato, kaj la voĉoj ricevitaj havas efikon de voĉoj donitaj en kunveno.

Kiam ne malpli ol dek anoj de iu komitato malaprobas iun decidon de tiu komitato kaj skribas al la sekretario en unu monato post la dato de la *Oficiala Gazeto*, kiu entenas la decidon, la sekretario de la komitato submetas la decidon, laŭ la formo aprobita de la prezidanto de la komitato, al ĉiuj anoj de la komitato por poŝta baloto. La decido estas konfirmata aŭ nuligata laŭ la baloto. Se la voĉoj estas egalaj, la decido restas.

Skriba decido, submetita al ĉiuj anoj de iu komitato kaj subskribita de tri-kvaronoj de la anoj, havas saman efikon, kiel decido en plena kunveno, kaj estas raportata al la sekvanta kunveno.

Ĉiu komitato havas la rajton starigi apartan kason por sia propra funkciado, kaj devas ĉiujare submeti al la Direktanta Komitato budĝeton por la sekvanta jaro. Ricevinte budĝeton de ĉiu komitato, la Direktanta Komitato difinas sumon por tiu komitato el la kotizoj de la membroj kaj el la ĝenerala kaso. Krom tio ĉiu komitato povas akcepti subtenon de la Societo de Amikoj de Esperanto, aŭ de aliaj societoj, aŭ de privataj personoj; sed ĝi ne rajtas fari ĝeneralan peton al la membroj de la Ligo por monsubteno, sen la aprobo de la Direktanta Komitato.

La ĝeneralaj rajtoj de ĉiu komitato de la Ligo ampleksas rajtojn:

1. Kontrakti en sia propra nomo, dungi kaj maldungi sekretarion kaj aliajn pagitajn oficistojn kaj fiksi iliajn salajrojn.

2. Delegi, laŭ difinitaj kondiĉoj, ĉiujn siajn povojn al subkomitatoj, konsistantaj el membroj de la Ligo, kaj fari regularon por la agado de tiaj sub-komitatoj.

3. Trakti aferojn kaj petskribi ĉe registaroj, parlamentoj, kaj publikaj korporacioj en la nomo de la Ligo.

4. Plenigi mankojn kaŭzitajn de morto, eksiĝo, aŭ forigo de iu komitatano aŭ oficisto. La anstataŭanto tiel elektita agos por la sama tempolimo, kiun rajtis agi la anstataŭito.

Estas rigardata kiel eksiĝinta el iu komitato de la Ligo:

1. Ĉiu ano dufoje sinsekve ne respondinta al leteroj aŭ cirkuleroj, ne partopreninta en voĉdonoj, kaj ĝenerale montrinta indiferentecon pri sia ofico;

2. Ĉiu ano publike kontraŭbatalinta Esperanton;

3. Ĉiu ano pro malglora ago kondamnita de iu leĝa juĝistaro al puno de malliberejo.

4. Ĉiu ano ĉesinta esti membro de la Ligo.

En ĉiu okazo, la eksiĝo estas decidata nur post esploro de la klarigoj de la interesato kaj la decido devas esti konfirmata de la Ĝenerala Komitato,

XV. — Centra Administrejo.

La Centra Administrejo de la Ligo estas loko, difinita de la Ĝenerala Komitato, en kiu la ĝenerala agado de la Ligo centriĝas, kaj en kiu funkciadas la Direktanta Komitato kaj la Ĝenerala Sekretario. La Ĝenerala Komitato povas difini oficejojn en iuj ajn landoj plej taŭgaj por la funkciigo de la Fakaj Komitatoj.

La Centra Administrejo estas gvidata de la Ĝenerala Sekretario, kiun helpas sekretarioj kaj, laŭbezone, oficistoj.

En la Centra Administrejo estas konservataj la fundamentaj kaj oficialaj dokumentoj de la Ligo, kaj el ĝi estas eldonataj la *Jarlibro* kaj *Oficiala Gazeto.*

XVI. — Ĝenerala Sekretario.

La Ĝenerala Sekretario havas la devon plenumi ĉion postulitan de ĉi tiu Statuto por esti farata de li, kaj agi laŭ la regularoj de la Ĝenerala Komitato kaj la Direktanta Komitato.

XVII. — Kaso.

La Centra Kaso estas administrata de la Ĝenerala Kasisto kun la helpo de la Ĝenerala Sekretario. Tiu kaso prizorgas la kutimajn spezojn de la Ligo. Ĝi ricevas la kotizojn, abonojn, flankajn gajnojn, kaj la donacojn, kaj pagas ĉiujn salajrojn de la Centra Administrejo kaj Redaktejo, kaj la sumojn dispartigotajn por la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj la diversaj komitatoj kaj fakoj de la Ligo.

La direktanta Komitato kaj ĉiu komitato kaj fako povas starigi garantian kapitalon laŭ kondiĉoj kaj reguloj aprobitaj de la garantiantoj.

La kapitalo de la Ligo estas administrata de tri ĝis kvin kuratoroj nomataj de la Ĝenerala Komitato. Tiu kapitalo formas la ĝeneralan rezervon de la Ligo, el kiu ĝi kreas novajn aranĝojn aŭ pagas jarajn deficitojn. Spekulado kun la havaĵo de la Ligo estas nepre malpermesata.

XVIII. — Propaganda Komitato.

La propaganda Komitato konsistas el la ses reprezentantoj, kiujn la societo-membroj elektas al la Ĝenerala Komitato.

Ĝi administras la Centran Propagandejon.

La Centra Propagandejo de la Ligo havas lokon ĉe 51, rue de Clichy, Parizo. Ĝi povas esti translokita en iun ajn alian lokon, laŭ decido de la Ĝenerala Komitato.

En la Centra Propagandejo estas konservataj la arkivoj de la Esperanta movado kaj la oficiala biblioteko.

La propaganda Komitato en ĝi organizas la propagandon ĉe registaroj kaj publikaj institucioj, la eldonadon de propagandiloj, kaj la kolekton de informoj kaj statistikoj pri la disvastigado de Esperanto.

XIX. — Servada Komitato.

La Servada Komitato konsistas el la ses reprezentantoj, kiujn la liganoj elektas al la Ĝenerala Komitato.

La Servada Komitato prizorgas la disvastigadon de la praktika kaj aplika uzado de la lingvo por komercaj, sciencaj, kaj intelektaj celoj. Ĝi daŭrigas la laboron kaj sekvas la tradicion de la Universala Esperanto Asocio. Ĝi rajtas organizi la servojn de la delegitoj por siaj celoj, kaj formuli instrukciojn kaj regulojn por ili. La instrukciojn kaj regulojn devas aprobi la Direktanta Komitato.

XX. — Oficiala Gazeto.

La Ligo eldonas je sia risko kaj profito *Oficialan Gazeton,* kiu estas la oficiala organo de la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj de la Ligo kaj de ĝiaj komitatoj kaj fakoj, kaj ĝenerala informilo pri la Esperanta movado.

Oficialaj avizoj en ĝi estas sufiĉaj por membroj kaj delegitoj, por la naciaj kaj fakaj societoj kaj iliaj reprezentantoj, kaj por ĉiuj komitatoj kaj fakoj kaj iliaj membroj.

Ĉar ne estas eble, pro la mondvasta agadkampo de la Ligo, ke avizo pri io farota atingu ĉiujn membrojn en plena tempo, estas konsentite, ke sufiĉas tempolimo de unu kalendara monato de la dato de ĝenerala poŝtelsendo de la *Oficiala Gazeto.*

Se izolaj Liganoj pro eraro aŭ pro alia kaŭzo, ne ricevas la *Gazeton,* tio ne malvalorigas la avizon aŭ decidon alprenotan.

XXI. — Kongreso.

La Ĝenerala Komitato organizos ĉiujare, kun la helpo de Loka Komitato, Universalan Kongreson de Esperanto, kaj fiksos ĝian lokon, tempon, kaj kondiĉojn.

En la Universala Kongreso de Esperanto povas partopreni „ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanton, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas“, kondiĉe ke tiu persono:

a) sendis sian aliĝon al la Loka Komitato, kaj

b) pagis la kotizon.

La aliĝo al la Kongreso komprenigas akcepton de ĉi tiu Statuto kaj de la Kongresa Regularo.

La celo de la Kongreso estas la esploro de ĉiuj demandoj kominteresaj por ĉiuj Esperantistoj, kun escepto de religiaj, politikaj, kaj sociaj demandoj, kiuj estas netuŝeblaj en Kongresa kunsido, kaj de lingvaj demandoj, kies esploro kaj solvo estas rezervataj al la Lingva Komitato kaj Akademio.

La Kongreso neniel rajtas alpreni decidojn devigajn, ĉu por izolaj Esperantistoj, aŭ por la Esperantistaj societoj, aŭ por la Ligo, sed ĝi plene rajtas esprimi dezirojn kaj konsilojn.

Por decidigi pri tiuj deziresprimoj aŭ konsiloj la Direktanta Komitato, kiel eble plej baldaŭ nepre devas submeti ilin al la Ĝenerala Komitato aŭ alia koncernata komitato, aŭ, se la afero tuŝas Statuton, al ĝenerala voĉdono de la Ligo.

La regularo de la Kongresoj estas fiksata de la Ĝenerala Komitato, kiu rajtas ŝanĝi ĝin de tempo al tempo.

Eventuala profito el Kongreso estos dividota en tri egalajn partojn: 1-e al la propaganda societo de la lando, kie okazis la Kongreso; 2-e al la ĝenerala kaso de la Ligo, por pagi deficitojn de antaŭaj aŭ estontaj kongresoj; kaj 3-e al la ĝenerala kaso de la Ligo por ĝiaj ĝeneralaj celoj.

XXII. — Rajtigitoj.

Ĉiu persono, kiu rajtas ĉeesti kunvenon (ĉu de la Ligo, aŭ de iu ĝia komitato aŭ sub-komitato) povas reprezenti samrajthavan personon, kaj povas, al sia propra voĉo, aldoni la voĉon de tiu persono, kondiĉe ke li donu skribrajtigilon je la komenco de la kunveno al ĝia preziganto aŭ sekretario.

XXIII. — Raportoj kaj Kontoj.

Raportoj pri la agado de la Ligo kaj bilancoj ĝis la fino de Marto estas publikigataj en *Oficiala Gazeto* ne pli malfrue ol en la monato junio.

Kontroliston de la Kontoj nomas la Ĝenerala Komitato.

XXIV. — Havaĵo.

La havaĵo de la Ligo estas destinata por la Esperanta movado. La membroj nek havas personan rajtojn je tiu havaĵo, nek estas respondaj por ŝuldoj de la Ligo. En la okazo de likvidado de la Ligo, ĝia havaĵo estas disponota laŭ la dicido de la Sekretario de la Ligo de Nacioj, aŭ de persono difinota de li.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO

Celo: *Disvastigi la uzadon de la internacia helplingvo Esperanto. — Plifaciligi la ĉiuspecajn moralajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo. — Krei internaciajn servojn uzeblaj de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj celas trans la limojn de ilia genta aŭ lingva teritorio. — Kreskigi inter siaj menbroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvigi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj. — UEA kunigas la samideanojn, kiuj per la forto de sia nombro kaj la utiligo de la Zamenhofa lingvo volas pruvi al la mondo, ke Esperanto vivas, taŭgas kaj progresas.*

Servoj: *Ĉiu membro rajtas peti informojn de la Delegitoj, uzi la servojn de la Asocio, senpage ricevi la Oficialan Jarlibron.*

Kotizoj: Oficialaj prezoj en svisaj frankoj. Membro (M): *5 Fr.*

Membro-abonanto (MA) ricevanta la gazeton: *12.50 Fr.* — *Membro-Subtenanto* (MS) ricevanta la gazeton: *25 Fr.* — *Membro-Dumviva* ricevanta la gazeton kun ĉiuj oficialaj dokumentoj: *300 Fr.* (Partopagoj trijaraj po 100 Fr., sed neniuj naciaj favorprezoj). Naciaj prezoj por M, MA, kaj MS: **Aŭstrio:** *Kr. 800, 2500, 6000;* **Baltaj Ŝtatoj:** *G. Mk 40, 120, 250;* **Belgio:** *Fr. 10, 25, 50;* **Britio:** *Ŝ. 5, 12/6, 25;* **Bulgario:** *L. 35, 80, 180;* **Ĉeĥoslovakio:** *Kr. 25, 65, 140;* **Danio:** *K. 5, 12.50, 25;* **Finnlando:** *Mk. 22, 60, 120;* **Francio:** *Fr. 10, 25, 50;* **Germanio:** *Mk. 40, 120, 250;* **Hispanio:** *Pes. 6, 15, 30;* **Hungario:** *Kr. 100, 300, 600;* **Jugoslavio:** *Din. 25, 65, 140;* **Italio:** *L. 12, 30, 60;* **Nederlando:** *G. 2.80, 7, 14;* **Norvegio:** *Kr. 6, 15, 30;* **Polio:** *Mk. 600, 2000, 5000;* **Portugalio:** *Esk. 8, 20, 40;* **Rumanio:** *L. 30, 75, 160;* **Svedio:** *Kr. 4, 10, 20;* **Usono:** *D. 1, 2.50, 5.*

La Helpmembroj (HM) kategorio provizore kreita favore nur al jenaj landoj kun tre malbona kurzo. Aŭstrio: Kr. 300; Hungario: Kr. 50; Polio: Mk. 300. Ili ĝuas ĉiujn rajtojn escepte la ricevo de la jarlibro, gazeto kaj enskribo en la interrilata adresaro.

La Entreprenoj de UEA (**komercaj firmoj, societoj k. t. p.**) pagas jare la oficialan aŭ nacian prezon kiel la MA. La Entreprenoj rajtas presigi tekston de 40 vortoj en speciala parto de la jarlibro kaj rajtas uzi la servojn de informpetado.

Centra Oficejo: *12, Boulevard du Théâtre, Genève (Svislando). — Bankkonto: Société de Banque Suisse, Genève. — Poŝtĉeko: I. 2310.*

Oka kongreso de UEA. La komisiono demandita per cirkulero dum majo, decidis ke la Oka kongreso de UEA okazu kune kun la XIV kongreso de Esperanto en Helsinki de la 8a ĝis 16 Aŭgusto 1922.

Eventualaj proponoj de ĝenerala intereso por la Dokumentaro devas alveni en la Centra Oficejo ĝis fino de junio.

Novaj prezoj. Ni konigas la novajn prezojn por la jenaj landoj kaj petas la Delegitojn noti tion:

Aŭstrio: Membro: 800; MA 2500: MS 6000 kr.;
Baltaj ŝtatoj: M: 40; MA 120; MS 250 Germ. Mark.
Germanio: M: 40: MA 120; MS 250 Mark.
Polio: M: 600; MA 2000; MS 5000 polaj Mark.
La prezoj por la anoncoj restas la kiel samaj ĝis nun

Repagigo de kotizoj. Ni informas niajn membrojn kiuj ne ankoraŭ pagis la kotizon por tiu-ĉi jaro, ke ni forsendis al ĉiuj nerepagintoj informon; nericevonte respondon ni enkasigos la kotizojn en tiuj landoj, kie poŝta enkasigo rekta aŭ interna ekzistas. Ni insiste petas akcepti la siatempe prezentotan poŝtrepagilon aŭ almenaŭ nin informi antaŭe por eviti senutilajn (kaj altajn) poŝtelspezojn.

Poŝtĉekkontoj. Ni ree atentigas, ke ni posedas kontojn ĉe la poŝto kaj insistas pagi per tiu-ĉi vojo. La kontoj estas sub la nomo de Universala Esperanto-Asocio kaj ne de oficisto. Ĉeĥoslovakio: Universala Esperanto-Asocio, Genève: Poŝtĉekkonto 79.236 Praha. Germanio: Universala Esperanto-Asocio, Genève: Poŝtĉekkonto 90850 Frankfurt am Main. Svisio: Universala Esperanto-Asocio, Konto I. 2310, Genève.

Statistika Demandaro. La Delegitoj ne ankoraŭ respondintaj tiun demandaron bonvolu tion fari kiel eble plej baldaŭ, tiel ke la informoj estu kiom eble plej kompletaj.

Statistiko de la poŝtajoj. — Movado de la poŝtajoj dum aprilo 1922: Ricevitaj: 932. Forsenditaj: 631. Entute: 1563. (Antaŭa monato: 1563).

Kotizoj por 1922. — Je la 31 Aprilo estis enkasigitaj 27 kotizoj de helpmembroj 1045 de membroj, 3281 de Membro-abonantoj kaj 110 de membro-subtenantoj. Entute: 4553. Entreprenoj: 68.

Subtenantoj.

Sesa listo:

100. S-ro Francesco Chierego, Trieste; 101. S-ro Martin Blicher, København; 102. S-ro Scetens, Paris; 103. F-ino F. B. Troy; 104. S-ro Ch. H. Grossmann, Lipton; 105. S-ro E. Legrand, Montevideo; 106. S-ro W. H. Fisher, Perth Amboy; 107. S-ro Gianfranceschi, Buffalo; 108. S-ro C. Winberg, Bengtsfors; 109. S-ro R. Bolliger, Bern; 110. S-ro Hans Jakob, Genève.

Garantia kapitalo. —

	Frankoj
Antaŭa listo	9025
Akiris duan kaj trian ateston de unua serio:	
S-ro Abel Waldmann, Lyon	250
Frankoj	9275

Donacoj.

La jenaj dumvivaj membroj bonvolis pagi kotizon de Membro-Abonanto aŭ Subtenanto:

S-ro Philipps, London (Substenanto); S-ro Henry Hetzel, Philadelphia; S-ro J. Hechtl, München; S-ro Blackett, Bath; S-ro Daingerfield, Oakland (Subtenanto); S-ro Johnson, Gibraltar; S-ro Fairman, London; S-ro Pollen, London; S-ino Blicher, København.

Al ĉiuj bonvolaj donacintoj koran dankon.

Novaj teritorioj: — Laŭ propono de la Ĝenerala Sekretario, la komisiono aprobis la starigon de jenaj novaj teritorioj kaj ĉefdelegitoj:

Okcidenta Usono: Amplekso: California, Washington, Oregon, Idaho, Nevada, Utah kaj Arizona. Ĉefdelegito: S-ro S. A. Vinzent, Del. de UEA en San Francisco, 400, California street.

Aŭstralio: Amplekso: La »Commonwealth of Australia«. Ĉefdelegito: S-ro W. Ballard, Del. de UEA en Melbourne, Landsdowne Road East St. Kilda.

Delegitoj. Delegitoj estas elektitaj en jenaj lokoj:

Alexandrie (Egiptio). — D.: S-ro G. Wilken, advokato, 4, r. Farahde VD.: S-ro M. Naschaat-Hafez, profesoro, Ragheb Pacha 636.

Carcii Mari (Rumanio, Satmar). — D.: S-ro A. Halasi, Preceptora Allampe-natae.

Červený Kostelec (Ĉeĥoslovakio). — D.: S-ino Berta Keyzlarova, Sokolská 7.

Charleroi (Belgio, Hainaut). — D.: S-ro Arthur Henraut, lernejestro, en Lodelinsart; VD.: S-ro Désiré Hallet, eldonisto, rue des Bouchers 13.

Cleveland (Usono, Ohio). — D.: S-ro Stanley K. Kozminski, 3406, Meyer Av.

Doncaster (Anglio, Yorkshire). — D.: S-ro A. J. Scott-Scott, inĝeniero, 48, Highfield Road.

Falkenstein i. V. (Saksio, Vogtland). — D.: S-ro Richard Otto Pfütze, instruisto, Feldstr. 18.

Herculane (Baile) (Rumanio). — D.: S-ro Jan Simon, mekanikisto.

Hirschfelde (Germanio, Saksio). — D.: S-ro Robert Pfennigwerth, papervendejo, Görlitzerstr. 22.

Huskvarna (Svedio, Smaland). — D.: S-ro Einar Adamson, jurnalisto, Norra Smaland.

Ibaŝfalaŭ (Rumanio, Transsilvanio). — D.: S-ro Jenö Scücs, Strada Horea 31.

Kaaden (Ĉeĥoslovakio). — D.: S-ro Alfred Proschka, poŝtoficisto, Wasserg. 170.

Kalisz (Polio). — D.: S-ro H. Przybylski, advokato, Warszawska ul. 5. VD.: S-ro Jakob Lustig, metiisto, Zlota ul. 19.

Lahti (Finnlando). — D.: S-ro Ilmari Söderström, ŝipestro, Vesiljärvi Station; VD.: S-ro Henrik Nieminen, horloĝisto, Rautatienka tu 13.

La Hulpe (Belgio, Brabant). — D.: S-ro Léon Bergiers, librotenisto, 11, rue Lauwers.

Langebrück (Germanio, Sachsen). — D.: S-ro Willy Kunath, fabrikisto.

Lequeitio (Central). Kubo. — D.: S-ro Antonio Gonzalez, korespondanto en sukerfabrikejo.

Levallois-Perret (Francio, Seine). — D.: S-ro Paul Jadot, librotensisto 17, rue Poccard.

Lom.-Palanka (Bulgario). — D.: S-ro H. P. Kungurov, doganoficisto, ĉinodnik Mitnicata.

Ludvika (Svedio, Dalarne). — D.: S-ro Bernhard Eriksson, libropresisto, Bot 153.

Nordmaling (Svedio, Västerbotten). — S-ro Jacob Jacobson, motoristo. Legfar.

Paris 1. — D.: S-ro Charles Tiard, inĝeniero, 24, r. des Bons Enfants.

Paris 5. (Francio). — D.: S-ro Paul Lobut, juristo, 32, bd. St. Germain.

Paris 9. (Francio). — D.: F-ino Fanny Bonet, profesorino, 12, pl. d'Anvers.

Perez-Millan (Argentino F. C. C. C.). — D.: S-ro Secundino Rofriguez, gasakvo fabrikanto.

Pospilje-Komiža (Jugoslavio, Dalmacio). — D.: S-ro Ante Borĉic, kooperativa oficisto.

Přibyslav u N. Brodu (Ĉeĥoslovakio). — D.: S-ro Jan Vencálek, komercisto.

Punta Alta F. C. S. (Argentino, B. A.). — D.: S-ro Francisco Gianfrini, elektristo.

Rogatica (Jugoslavio, Bosnio). — S-ro Nikola Lisac, poŝtoficisto.

Rosice (Ĉeĥoslovakio). — D.: S-ro Rudolf Kopecký, úředník rafinerie cukru.

Shumen (Bulgario). — D.: S-ro Xenofon Jankov, infanteria oficejestro, Ploklandeĉova 396.

Stone (Anglio, Staffordshire). — D.: S-ro J. R. Miller, komerca vojaĝisto 14, Meakin Avenue.

Tarnow (Polio). — D.: S-ro Ksawery Alfus, bankoficisto, Wiedenski Bank Zwiazkowy.

Trutnov (Ĉeĥoslovakio). — D.: S-ro Fr. Dvořák, oficisto de ŝtataj fervojoj, Kostelní 21; VD: F-ino Else Nykliĉek, Pragerstr. 6.

Voghera (Italio, Pavia). — D.: S-ro Giuseppe Quarone, fervojisto ĉe F. S. Corso 27, Marzo 49.

Zaandam (Nederlando, Noord Holland). — D.: S-ro P. Krijt, bankoficisto, Schoolmeesterstraat 62; VD.: S-ro Dirk Romeijn, razisto, Rustenburg 99.

Zutphen (Nederlando). — D.: S-ro P. J. Soeters, instruisto, Kuiperstr. 25a.

Ŝanĝoj.

Aschmeritz (Ĉeĥoslovakio). — D.: S-ro Theodor Kilian, instruisto.

Bydgoszsz (Polio). — D.: S-ro Fr. Prengel, komercisto, Kordeckiego 1a; VD.: S-ro Arthur Pankratz, redaktoro, Pomorska 15.

Gävle (Svedio). — D.: S-ro Gustav Hedström, fervojisto, Södra Centralg. 10. VD.: S-ro Albert Liljemark, komercisto, Södra Centralg. 28.

Göteborg (Svedio). — D.: S-ro Nils Gunnar Nilsson, korbisto, VI., Lundgatan 3. v. 1., 2.

Graz (Aŭstrio, Steiermark). — D.: S-ro Adolf Halbedl, juristo, Schulgasse 24; VD.: S-ro Ignaz Wallner, Pestalozzistr. 65.

Harnäs (Svedio, Uppland). — D.: S-ro Karl Söderström, laboristo, VD.: S-ro Axel Andesson, laboristo.

Hastings (Anglio, Sussex). — D.: S-ro J. J. Boutwood, komercisto, Holland House, Laton Road.

Huesca (Hispanio). — D.: S-ro José Artigas Lasala, instruisto, Lanuza 4; VD.: S-ro Fidel Oltra, fotografisto, Coso alto 32.

Leiden (Nederlando, Zuid Holland). — D.: S-ro P. J. Hoope, pentristo, Middelweg 27b.

Madrid (Hispanio). — D.: S-ro Luis Rodriguez Escartin, fervojoficisto, Ilustracion 8; VD.: S-ro Indalecio Rosch, Camino Bajo de San Isidro 2. Pral.

Mexico (Meksiko). — D.: VD.: S-ro Manuel G. Rodriguez, Apartado Postal 2482.

La supraj elektoj fariĝas valoraj, se ĝis 30 tagoj post la nuna publikigo neniu membro protestas pro gravaj kaŭzoj. Intertempe la novaj D. kaj VD. agas provizore.

ANTAŬ- KAJ POSTKONGRESOJ

Postkongreso en Kopenhagen.

Dum la lasta reprezentantara kunveno en „C. D. E. L.“ ni diskutis, ĉu ni aranĝu antaŭ aŭ postkongreson en Kopenhago tiun-ĉi someron. Por tiu celo ni serĉis informojn en Finnlando kaj ankaŭ en Stockholm, tiel ke ni Kopenhagaj Esperantistoj ne aranĝu kongrestagojn samtempe, kiel niaj svedaj samideanoj okazigos sian kongreseton.

La Loka Kongresa Komitato en Helsinki respondis, ke ĝi opinias, ke antaŭkongresoj ne estas dezirindaj, ĉar ili pli malpli konkurencas kun la ĉefa kongreso; tamen la Komitato ne rigardas antaŭkongresojn en skandinavaj urboj tiel danĝeraj el konkurenca vidpunkto kiel antaŭkongresojn en meza Eŭropo.

Pro tiu opinio de la Loka Kongresa Komitato ni decidis aranĝi ne antaŭ-sed postkongresan viziton en Kopenhagen kaj ĉar niaj svedaj samideanoj alvokos al kongreseto en Stockholm la 15^an^ kaj la 16^an^ de Aŭgusto 1922, ni fiksis niajn kongrestagojn je la 18^a^ kaj la 19^a^ de Aŭgusto.

Nia ĉefurbo Kopenhagen estas tre vidinda pro ĝia bela situacio ĉe la blua maro, kio ankaŭ donis al ĝi la nomon: la norda Atheno. Kaj la urbo mem, kiu leviĝas kontraŭ la ĉielo per multaj fieraj turoj, estas konata pro kia gustoplena arhitekturo kaj pro ĝiaj riĉaj artotrezoroj. Ankaŭ la ĉirkaŭaĵo kun la multaj verdaj fagarbaroj faros solenan impreson al la eksterlandanoj.

Laste ni ne forgesu nian mondkonatan amuzejon „Tivoli“, kiu estas unika en la tuta mondo.

Post morato ni elsendos pli detalan programon, esperânte, ke la kongresvojaĝontaj jam nun pripensos la eblecon koncerne viziton en Kopenhago, kie ni Danaj Esperantistoj deziros al ili „Koran Bonvenon“. (Oficiala Komuniko de la Centra-Dana Esperantista Ligo.

TRA LA GAZETARO

Propagando per la gazetaro. La „Bulletin de la Société Française pour la propagation de l'Esperanto“ donas jenajn konsilojn kiuj estas rekomendindaj en ĉiuj malgrandaj urboj.

En provincaj urbetoj ĝenerale aperas semajna gazeto kun karaktero pure loka, ne plenega je sensaciaj novaĵoj, sed legata de la tuta popolo. La esperanta grupo facile enpresigos siajn komunikaĵojn se ĝi prezentas ilin kiel lokajn okazintaĵojn. Ekzemple la eldonisto neniel atentos je tia noto: „La brazila registaro jus enkondukis la instruon de Esperanto en ĉiuj liceoj.“ Sed li certe presigos ĉi tiun: „S-ro Benoit, porkajisto, prezidanto de la Esperanta Grupo en nia urbo, kunigis lastan semajnon siajn multajn adeptojn en la Urba Biblioteko, kie kunvenas regule la grupo. Inter aliaj komunikajoj li konigis al ili la gravegan decidon jus alprenitan de la Registaro de Brazilo k. t. p. k. t. p. Post diversaj parolaj ekzercoj, la kunveno finis per kantoj kaj monologoj de la elito de nia junularo.“

Brazila Vivo (r. General Sampaio 330, Fortaleza, Ceara). — Nova kvarpaĝa gazeto La stilo estas plibonigebla! Cetere la eldonantoj presas ke „la enhavo de tiu ĉi n-ro ne kontentigas nin, en la venontaj n-roj ĝi pliboniĝas.“

La Paco (Otani Universitato, Tokio). — Japana hektografita gazeto kun celo propagandi Budhismon. Ĉiu kiu sin interesas pri religiaj kaj moralaj temoj profite legos tiun gazeton aperontan 4-foje po jaro.

Esperanta Finnlando enhavas tre interesan artikolon pri la instruo de Esperanto. Jen ekstrakto:

Ni pensu pri kelnero okupata de mateno ĝis malfrua nokto per sia ofico. Ĉu ni vere, kun ia espero pri sukceso, povas fari lin esperantisto praktike uzanta la lingvon en sia metio? Mi dubas pri tio, ĝis kiam ni havos pli bonajn instruilojn. Eble ni per propagandaj paroladoj aŭ per aliaj propagandiloj sukcesis konvinki lin pri la facileco de la lingvo. Eble li jam komencis la lernadon. Sed poste — en naŭdek naŭ okazoj po cento — leginte kelkajn centojn da paĝoj pri feinoj, pri ĉiuspecaj infanaĵoj, pri amindumaĵoj, pri militaj aŭ religiaj aferoj, pri naturbelaĵoj k. t. p. kaj ne lerninte eĉ la dekonon de tio, kion li bezonas en sia metio, li forlasos la studadon, tedita de la multeco de aĵoj, kiujn li devas lerni, por ke li estu kapabla servi siajn klientojn per la helpo de Esperanto. Same okazus al fervojistoj, tramvojistoj, ŝipanoj, barbiroj, policanoj, poŝtaj kaj telegrafaj oficistoj k. t. p.

La aŭtoro S-ro Oskari Eriksson konkludas ke oni devas eldoni malgrandajn gramatikojn speciale verkitajn por la diversaj metioj (kelneroj, doganistoj, razistoj, fervojistoj k. t. p.)

Ukraina Stelo. — Tiu gazeto kiu ne plu aperis de 1914 estas reeldonata de S-ro Orest Kuzjma, Nova ul. 6, Kolomea Polio. La unua N-ro enhavas artikolon pri Ukrajnio kaj du literaturaĵojn.

Sennacieca Revuo. — Presita sur belo papero kaj pliriĉigita per interesaj desegnaĵoj tiu gazeto estas unu el la plej luksaj esperantaj gazetoj. La lasta N-ro enhavas literaturajn artikolojn de Barbusse, Tolstoj, A. Rzewski, k. t. p.

Literaturo daŭrigas sukcese sian vojon. Lukse presita ĝi enhavas plie internacian enhavon. La lasta n-ro enhavis „La Avara Kavaliro“ de Puŝkin, fabelo de Andersen, rakontoj el la hungara kaj pola lingvoj, originalaĵoj de Steonan Živanovič kaj de Zamenhof.

France-Esperanto sed ne bulteno de S. f. p. E. Kiel ni diris erare anstataŭas „Francan Esperantiston“. Ĝi enhavas detalojn pri la movado kaj bonegajn propagandartikolojn.

Bizantio. La lasta n-ro estas speciale interesa. Krom literaturaj artikoloj ĝi enhavas detalojn pri la turkaj manĝaĵoj, rakonton pri peresperanta vojaĝo de S-ro P. T. B. Hudson de Australio medicinan kronikon. Ĉar la esperantistaj kuracistoj ne sukcesas trovi la monon por aperigo de medicina gazeto, ĉu ili ne povus kunlabori kun Bizantio al kiu jam kunlaboras kelkaj kuracistoj?

TRA LA FAKOJ

Skolta Esperantista Ligo

Lastatempe interesaj kaj tre kuraĝigaj informoj alvenis al ni el Usono.

S-ro Ward Nichols, sekretario de la Committee on International Auxiliary Language (Komitato pri Internacia Helpa Lingvo) de la International Research Council (Internacia Esplora Konsilantaro) mem estas Esperantisto kaj energie laboras por nia afero.

En longa interesplena letero kiun ni ricevis li priskribas sian lastatempan agadon.

Ĉe kunveno de la knaboskoltoj de la Distrikto de Kolumbio, prezidata de Juĝisto Thompson, li priparolis la skolto-esperantomovadon. Ankaŭ paroladis Doktoro F. G. Cottrell, Prezidanto de la Komitato por Internacia Helpa Lingvo. Tiu lasta sinjoro pasigis grandan parton de lasta jaro en Eŭropo por studi la problemon de Internacia Helplingvo. Li ĉeestis la XIIIan en Praha, la kunsidon de la Ligo de Popoloj kaj la ĉiujaran konferencon de la British Association (Brita Asocio). Li intervjuis ĉiun kiu rilatas la aferon, de Lia Nobela Moŝto Robert Cecil ĝis la Propaganda Fakestro de SEL. Aparte de lia lingva laboro li estas bonekonata fizikisto.

S-ro Ward Nichols, instruas klason el Trupo N-ro 39, lokita en la meza kvartalo de Washingtono. Unu el liaj lernantoj estas Trupestro Doktoro C. Wythe Cooke (de la Usona Geologia Societo) kaj alia estas la filo de la Ministro de Guatemala-Bianchi.

Leginte mian artikolon en Esperanto Triumfonta numero Januaro 8, li tuj ĝin tradukis kaj sendis, kun la ĵurnalo, al la Ĉefuloj de la Skolta Movado en sia distrikto kaj ricevis respondon ke ili intencas pritrakti la tutan aferon de nia Ligo kun S-ro Baden Powell.

Ankaŭ ili intencas pridiskuti la aferon ĉe la „Malferma Kunsido“ de la Skoltaj Ĉefsidejoj de la Mondo, okazonta Julion en Parizo.

Geskoltoj, eks-geskoltoj, aniĝu tuj al via propra Ligo. Helpu al ni atingi niajn kaj viajn celojn. Kunlaboro certigas finan venkon. Tuj vin turnu al la Honora Ĝenerala Sekretario, Trupestro Norman Booth, M. S. P., Netherton, Huddersfield, Yorkshire, Anglujo.

J. W. Leslie, Propaganda Fakestro de SEL.

KOMERCO KAJ INDUSTRIO

Ĝis kiam „Internacia Komerca Revuo“ staros sur firma bazo, ni donas la nia kolego Unger iom da loko en nia gazeto. Ni esperas, ke baldaŭ venos la tempo, kiam I. K. R. (adreso: Zürich 1, Svislando, Centra Poŝtfako 6104) povas aperadi regule kaj subtenata de multaj amikoj. Estus tre necese ke: „Internacia Komerca Revuo“, vere praktika gazeto verprudente redaktata, vivu kaj ni deziras al ĝi plenan subtenon.

Foira movado

„Suomen Messut“, la Finnlanda Foiro“ en Helsinki, sendis al ĉiuj foiroj de la mondo leteron en Esperanto. Estas invito al „2a konfererenco de foiroj“, okazonta dum la Universala Kongreso de Esperanto en la Finna ĉefurbo. Tiu konferenco daŭrigos la laboron komencitan lastjare en Praha. Ĝis nun respondis la foiroj en Basel, Breslaŭ, Fredericia, Frankfurt, Leipzig, Malmoe, Paris, Reichenberg kaj Utrecht.

La direkcio de „Finnlanda Foiro“ laboras en plena harmonio kun „Internacia Komerca Revuo“. Preparaj laboroj jam komencis. Por starigi definitivan programon, foiruloj estas petataj, *tuj* skribi al „Suomen Messut“, Esperanta Sekretario, Helsinki (Finnlando).

Esperantista Parolejo

Oni laŭdas!

Ni presigas en ĉi tiu senpaga rubriko dankojn nur pri gravaj servoj plej nuniamitaj de delegitoj.

La C.O. de UEA, kare dankas al S-ro *Norman W. Frost,* en Cambridge, USA. Mass. por afabla sendo de statistikaj informoj.

S-ro *W. M. S. Bothwell* en Ilford kore dankas S-ron Roncati, Del. en Nice pro lia tutkora akcepto kaj havigo de turistaj informoj.

S-ino *Marie Baroch* en Slezská Ostrava tutkore dankas al F-ino Julia Wolfson en Breslaŭ por ŝia sindonema akompanado dum ŝia restado en Breslaŭ kaj el gesinjoroj Sigmund Freund en Breslaŭ por ilia afabla gastemeco.

S-ro *Kurt Kauffmann,* Del. en Heidelberg, dankas al S-roj P. Burgermeister (Basel), R. Bolliger (Bern), H. Jacob (Genève), bh. Jayet (Morges), S-ino Kohl (Lausanne), S-ro Ducommun (Le Locle) kaj S-ro Stroele (Neuchâtel) plej korege pro ilia vere gastema akcepto dum vojaĝo al la Konferenco.

F-ino *J. Šupichová,* Del. en Praha, dankas al ĉiuj ĝenevaj gesamideanoj, precipe al Ges-oj: prof. Bovet, Dro Privat, S-ro del. Bouvier, F-ino Dubois, S-ro Jakob, S-ro Richez, S-ino Blondel, F-ino Greiner kaj S-ro Dodekan pro ilia tre afabla akcepto kaj amikeco.

La Esperantistoj el landoj kun malfavora kurzo, kiuj estis tiel afable kaj malavare gastigataj dum la Konferenco pri instruado de Esperanto, korege dankas la Komitaton de l'Konferenco, la Ĝenevajn Gesamideanojn kaj ĉiujn, kiuj sendis donacojn por la Konferenco.

S-ro *Vilhelmo Perjes* el Budapest dankas korplene al S-ro Fritz Michalek delegito en Reichenberg, kaj al S-ro J. Applebaŭm delegito en Liverpool por iliaj gravaj servoj kaj informoj.

S-ro *G. M. de Villa* VD. en Habana, Cuba, kaj lia edzino dankas tre kore pro ĝentilaĵoj aŭ servoj dum ilia vojaĝado tra Eŭropo jenajn samideanojn: en Bad Reichenhall: S-ro F. Mayerhauser, D. kaj F-ino Vitzthum, VD.: en Karlsruhe: S-roj Futran, D.: Bode kaj Treitel.

F-ino M. kaj S-ro *J. Jansen*, Kristiania kore dankas VD. F-inon Martha Rabe, Berlin, por afablaj faritaj servoj. Samtempe F-inoj Jansen, Jörgensen kaj Henriksen kore dankas F-inon Rabe por afabla helpo dum trapaso tra Berlin.

S-ro *B. David*, del. en Cluj tutkore dankas Gesinjorojn Eissen, del. en Lupeni por ilia afabla kaj amika gastemeco.

Esperantista Vivo

Naskiĝoj. Al gesinjoroj *Lubomir Nenov* naskiĝis filino.

Al gesinjoroj *At. D. Atanasov* en Sofia ankaŭ naskiĝis ido.

Al Ge-roj *M. L. Kaplan* en Wolkowysk, Polio naskiĝis filo nomita Izrael.

Fianĉiĝo. — S-ro *Ludovik Alseika* D. en Dotnava, Litovio, kun F-ino Marija Lukoševiĉaite.

Niaj Mortintoj

Kun bedaŭro ni ricevis informon pri la morto de jenaj samideanoj. Al iliaj familioj ni sendas la esprimon de niaj respektplenaj kondolencoj.

D-ro **Asnes**, malnova esperantisto, redaktinto de „Ruslanda Esperantisto“ kaj estinta Prezidanto de Societo „Espero“ en Petrograd.

S-ro **Oldmeadow**, propagandisto en Victoria, Australio.

Phillip Selick, eksprezidanto de la grupo de Liverpool mortis 66 jara. Li estis entuziasma esperantisto kaj multe laboris por la blinduloj.

E. Adam, redaktinto de Sennacieca Revuo mortigis sin en oktobro 1921. Li skribis jenon en lia testamento: „Oni silentu pri mia morto. Se mi havas amikojn, ili ne funebru, sed male ĝojn. Oni ne malŝparu lokon en la gazeto por in teda nekrologia artikolo. Se mi ne estus plene konscia pri la sensignifo de mia vivo eble mi kuraĝus diri al la kunbatalintoj: se vi volas iel rememori pri mi, tio estu nur per senlaca propagando por sennacieca lingvo. Malgraŭ la deziro de la mortinto ni ne povas silenti lian malaperon kaj ni devas rememorigi ke li estis sperta, larĝidea kaj progresema esperantisto kun realaj ideoj. Li energie estris la interesan „Sennaciecan Revuon“ nun redaktatan de E. Lanty.

S-ro **Hans Thorvald Stub**, Kristiania, mortis la 20 aprilo, en sia 54ª vivjaro, post multaj jaroj da malsano. Li iam estis sekretario de nia klubo, ankaŭ lerta tradukanto kaj al siaj ne malmultaj alilandaj amikoj fidela korespondanto. H. B.

Komandanto **Duménil,** eksleŭtenanto de kapitano Baxol kun kiu li, ĉetserĝento Tabary kaj Serĝento Blin starigis, antaŭ 1914, gravan esperantistan grupon ĉe la 51ª Infanteria Regimento, mortis la 28ªⁿ de aprilo 1922, en Colmar (Haut Rhin), kie li estis majoro ĉe la 152ª Infanteria Regimento.

SSᵒʲ Bayol, Tabary kaj Blin estis mortigitaj dum la milito, sola, Duménil postvivis.

Grava perdo por nia propagando, ĉar ĉiu memoras kiel agemaj ili estis! Kore funebros la Samideanaro.

Nia simpatiema **Kolonelo Roberto Ricciardi,** Delegito de Itala Federacio, al kiu oni ŝuldas la unuan kaj pli fortan apogon de la registarigo de esperanta movado en Napoli, estis ĵus frapita de la morto de du gefiloj: 15 jara fraŭlino kaj 2 jara infaneto. Ĉiuj esperantistoj kore partoprenas la doloron de nia kara samideano kaj esprimas al li la plej sincerajn kondolencojn. F. G.

ŜAKO

Gvidanto: *Fr. Hájek*, Praha-Nusle, Přemyslovo nábř. 396. Ĉeĥosl.

Ĉion kio koncernas ŝakon, sendu senpere al la gvidanto.

Problemo N-ro 36.

P. A Orlimont

(Haagsche Post 1921)



Blanko matas per la 3-a movo

Problemo N-ro 37.

W. Preiswerk

(Basler Nachricht. 1922)



Blanko matas per la 2-a movo

Problemo N-ro 38.

Ph. Klett

(Reproduktaĵo)



Blanko matas per la 2-a movo.

Problemo N-ro 39.

W. A. Shinkman

(Reproduktaĵo)



Blanko matas per la 4-a movo.

Solvoj de la problemoj.

N-ro 34. 1. d2—d4 ktp.

N-ro 35. 1. Tb3—h3, 2. Th3—h1, 3. Dh8×h1 mato.

Ludo N-ro 4, *franca defendo.*

Ludita dum la telefona vetludo inter la urboj Rio de Janeiro kaj São Paulo en Brazilio, okazinta fine de jaro 1921. La vetludon gajnis Rio sen perdo per 6 punktoj, nuliginte 2 ludojn.

Blanko: *D-ro B. de Oliveira*, Rio de Janeiro.

Nigro: *Guilherme Saiss*, São Paulo.

1. e2—e4 e7—e6
2. d2—d4 d7—d5
3. Ĉb1—c3 Ĉg8—f6
4. Kc1—g5 Kf8—e7
5. Kg5×f6 Ke7×f6
6. Ĉg1—f3 b7—b6
7. Kf1—d3 Kc8—b7

Antaŭ ĉi tiu movo estis necese per h7—h6 firmigi la reĝan flankon.

8. e4—e5 Kf6—e7

Nun okupas ambaŭ K kampojn malmulte da ludpovo al ili permesantajn.

Ĉu ne estus Kf6—g5 provinda?

9. Ĉc3—e2 c7—c5
10. c2—c3 0—0
11. h2—h4 c5×d4
12. c3×d4 Ĉb8—d7

La Ĉ devus okupi c6.

13. Ĉe2—f4 Tf8—e8

Al h7—h6 sekvus g2-g4.

14. Kd3×h7+ Rg8×h7
15. Ĉf3—g5+ Rh7—g8
16. Dd1—h5 Ke7×g5

Blanko anoncas la maton per la 4-a movo.

(hg5 Rf8, Dh8+Re7, Ĉg6+ fg6, Dg7 mato, aŭ hg5 f5, Dh8+ Rf7, g6+ Rg6, Dh5 mato).

(laŭ Brasil Charada)

Alvenis ĝustaj solvoj de la problemoj.

N-ro 29, 30, 33, 34 S. Frantz, Paris (Franc.); 30, 31, 33 O. Ganster, Salzburg (Aŭstr.); 30, 31, 32 M. Esteban, Madrid (Hisp.); 34, 35 Th. Rawlinson, Liverpool; 35 H. T. Bailey, London (Angl.).

REKLAMO

Nur anoncoj kun *samtempa* pago estas notataj. Ni akceptas la anoncojn laŭ la disponebla loko kaj ne povas garantii la aperon en difinita N-ro. Ni ne sendas pruvnumerojn kaj rekomendas al la anoncantoj aboni nian gazeton. Ni ne akceptas respondecon pri la sekvoj de anoncoj.

KORESPONDADO

TARIFO: Unu enskribo (la adreso kaj ne pli ol 5 vortoj): Fr. 0.75. — Por ĉiu plua linio (= 10 vortoj) Fr. 0.50.

Unu enpreso en nacia mono: *Aŭstrio* 50 Kr.; *Belgio* 1.50 Fr.; *Britlando* $7\frac{1}{2}$d.; *Bulgario* 10 Lev.; *Ĉeĥoslovakio* 5 Kr.; *Finnlando* 4 F. M.; *Francio* 1.50 Fr.; *Germanio* 5 Mk.; *Hispanio* 1 P.; *Hungario* 30 Kr.; *Italio* 2 L.; *Jugoslavio* 10 Kr.; *Nederlando* 40 Cent; *Pollando* 100 M.; *Skandinavio* 1 Kr.; *Svislando* 0.75 Fr.; *Usono* 0.15 Cendoj. — Kie la aĉeto de respondkuponoj estas ebla, oni sendu tiajn. (Unu enskribo = 4 respondkuponoj.)

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarkoj sur bildflanko.* k. ĉ. l. = *kun ĉiuj landoj.* Esp-aĵo = *Esperantaĵo.*

Atentigo!

La personoj anoncantaj havas la moralan devon respondi almenaŭ unufoje al la ricevitaj petoj, klarigante ĉu ili deziras aŭ ne deziras daŭrigi la korespondadon. Kiu ne respondas peton konforman al sia anonco, tiu malutilas al la internacia korespondado per Esperanto.

Aŭstrio.

Wien, 13/4. — S-ro Josef Kolnhofer, Zehetnergasse 37, PM. PK. Esp. Gaz. ne respondas senvalorajn PM. Vidu rubrikon „Petoj kaj proponoj".

Belgio

Antwerpen — S-ro D. Dielen, instruisto, Pioenstr. 1 Berchem, L, PK, bfl esp-aĵoj.

Britio

Doncaster. — S-ro Oswald Clark, tanisto, Briarcliffe, L, PI pri ĉiaj temoj.

London N. N. 2. — S-ro Cecil Craft, 51 Villiers Road, Willesden Green, PM, L, PI, k. ĉ. l. (precipe kun fraŭlinoj).

Preston. — S-ro Nöel Binstead 8, Herschell St., L (precipe pri senkulturaj floroj).

Uxbridge. — S-ro Frederick Bradburg, 1, Ickenham Close, Ruislip kaj 7 lernantoj PI.

Bulgario.

Bukiovtzi. — **Rahovo.** — S-ro Semko Tonev, instruisto, PI, L, k. ĉ. l.

Sevlievo — S-ro Dimitr R. Karageozov, L, PI, bfl, papermono.

Ĉeĥoslovakio

Brno. — S-ro F. Medek, Česká ul. 6. PM k. ĉ. l., PI kun ekstereŭropanoj.

Holešov (Moravio). — F-ino Jarmila Chmelařová, Žopská ulice, k. ĉ. l., PI, L pri diversaj interesaj temoj.

Holešov (Moravio.) — S-ro Karel Bednařík, instruisto, PM el ĉiuj landoj po serio.

Oleška, p, Kostelec n. č. lesy. — S-ro L. Mazel, instruisto, PI, L, interŝ. lernejlaborojn, k. ĉ. l.

Poprad—Velka, Slovakio, Ges-oj Eichmüller, Elizabetstr. 1., L. (pri naciaj manĝaĵoj kaj kuiraĵoj).

Praha. — S-ro Inĝ. B. Molnár, poŝtfako 214, L (pri okultismo).

Praha—Bubeneč 113. — S-ro Kominek Rutoš, PM, PI, bfl, precipe kun ekstereŭropanoj.

Praha—Vinohrady. — S-ro Václav Pikard, Palackého 59, PI, PM.

Praha—Smichov. — S-ro Karel Vosátko, úředník M. N. O., Štefanikova 54, PM.

Stará Boleslav. — S-ro Josef Poláček, kun instruistoj el Francio, Anglio, Italio, Jugoslavio, Polio, Norvegio, Svedio, L. PI, gaz.

Estonio

Haapsalu. — S-ro Joh. Tamverk ne plu kolektas PI, PM.

Tallinn. — S-ro I. Baskin, Lŭwalaia 23, L, PI, kun fabrikistoj, komercistoj, spertaj filatelistoj.

Tarto. — S-ro Alfred Sover, Kalda 17, PI kun ekstereŭropo. Eŭropo: nur popolaj kostumoj.

Finnlando

Helsinki. — S-ro Karl Oeder, Kreutzgatan 2, nur PM, k. ĉ. l.

Helsinki. — S-ro N. Adnschkevitsch Museogat 11 A. 18, PM, k. ĉ. l.

Parola. — S-ro T. A. Lindberg, PI, (stacidomoj, lokomotivoj kaj aliaj fervojaĵoj), Indiku kion vi deziras.

Uusikaupunki. — S-ro K. Walovuori, komercisto, PM.

Francio

Cholet (Maine-et-Loire). — S-ro Marcel Guillaux, 128, rue du Paradis, PI, PM, k. ĉ. l.

Paris. — S-ro F. Brienne, 10, rue de Belzunce, PI, PM, k. ĉ. l.

Germanio

Breslau X. — S-ro Oscar Lindner, Michaelisstrasse 62, PM, PI, k. ĉ. l.

Heidenau S. — S-ro Wilhelm Machata, Hauptst. 7, PI, bfl, L, esp. gaz., k. ĉ. l.

Leipzig. — S-ro Kurt Götze, Könneritzstr. 15, ĉe Angelstein, L, PI, PM, esp-aĵoj.

Leipzig. — S-ro Erich Weisse, Nordstr. 44, L, PI, PM, esp-aĵoj.

Plauen (Vogtl.). — S-ro Kurt Kripfgans, Antonstr. 29 I, PI, bfl, PM.

Plauen (Vogtl.). — S-ro Kurt Höfer, Topfmarkt 11, PI, bfl, PM, esp. gaz.

Walbeck (Gardelegen). — S-ro Grimm, 23jara, PI, L, (pri muziko).

Walbeck (Gardelegen). — S-ro Schindelhauer, 27jara instruisto, PM, PI, L (pri pedagogio, ŝako, sporto).

Welper (Westfalen). — S-ro August Wetterstein, serĉas korespondantojn por siaj gelernantoj.

Wurgwitz—Dresden. — S-ro A. Wolf, komercisto 5, P, PI, L, PM, monerojn, monbiletojn kun eksterlando.

Grekio.

Le Pirée. — Maison de Commerce „ESPERO". Desiras interŝanĝi PI kun ĉiuj landoj. Respondas ĉiam. Skribu vian adreson precize, legeble.

Hispanio

Girona. — S-ro Lluis Morillo, Plaça Mercadal 3-3 et., PI, PM, L, k. ĉ. l.

Zaragoza. — S-ro Jesus Igea, Banko Hispano Amerikano. Sendas ilustritajn Hispanajn gazetojn kaj belegajn poŝtkartojn, interŝanĝo de uzitaj poŝtmarkoj ĉl.

Hungario

Aszod. — S-ro Dezsö Hajdú, Petöfi fögimnázium, nur PI (precipe urbbildoj, blf.)

Budapest. — S-ro Fenyes Zoltan, Dob-u. 5/II, PK, PM (rekomendite, sendu unue).

Budapest. — S-ro Adám Mátjé, bakisto, VI., Dohány u. 71, I., 2., fotografaĵoj, leteroj, PI, k. ĉ. l.

Budapest X. — S-ro Stefan Osztovits, Ihász u. 5 sz., PI, L, k. ĉ. l., bfl.

Miskolcz. — S-ro D-ro Gózon Géza, PM, (precipe kun balkanaj kaj aliaj europaj ŝtatoj).

Nyiregháza. — S-ro Béla Burró, Nádor utca 40, PI, bfl, PM, k. ĉ. l.

Nagykőrös. — S-ino G. Khirer, IV., 147, PI, esp-aĵoj, k. ĉ. l.

Rákospalota. — S-ro Stefan Pasztor, Petőfi u. 2, L, PI, k. ĉ. l.

Italio

Lampedusa (Girgenti). — S-ro O. Di Maggio, PI de famaj homoj en ĉiuj branĉoj de aktiveco kaj ideoj.

Trieste. — S-ino Margherita Vitoppi, via Luigi Ricci 10., IV. etaĝo, PI k. ĉ. l.

Nederlando

Amsterdam. — S-ro N. A. Zilver, P. O. B. 1055, PK, PM (escepte Ĉeĥoslovakio).

Culemborg. — S-ino N. Bonhof — v. d. Geer, PI, k. ĉ. l.

Scheveningen. — S-ro Cor Vrolijk, poŝtoficisto nur PI (urbvidaĵoj, panoramoj, pejzaĝoj, montvidaĵoj, naciaj kostumoj) bfl k. ĉ. l. koresp. postflanke.

Scheveningen. — S-ro Willem Vrolijk, elektrikisto, Maaswijkstraat 130, PI, bfl k. ĉ. l., koresp. postflanke (urbvidaĵoj, pejzaĝoj, montvidaĵoj, panoramoj).

Pollando

Bialystok. — A. Ajzenszmidt; Fabryczna 19, PM, papermono (interŝ., vend.).

Bialystok. — S-ro J. Ajer, Skrzynka Pocztowa 53, L, PI, bfl, papermono.

Rzeszów. — F-ino Ada Freundlichówna, Zamkova 4, PI, artajn bfl. k. ĉ. l. precipe kun ekstereŭropo.

Rumanio

Braŝov. — S-ro Frederiko Hubes, inĝeniero arkitekta, Strada Lunga 151. L, PI, k. ĉ. l.

Braŝov. — S-ro Frederiko Deŭbel, fabrikisto, Burggasse 23. L, PI, k. ĉ. l.

Braŝov. — S-ro Otmaro Trentina, gimnaziano V. kl., Tg. Inului 34. L, PI k. ĉ. l.

Ruslando

Astraĥanj. — S-ro Bazil Averin, 6 nĉ 3 Bakald N. 30. PI, L, PM, gaz. k. ĉ. l.

Astraĥanj. — S-ro Fedor Savin, Pristanskaja 6, deziras komercajn katalogojn, esp. propagandajn afiŝojn.

Homel. — S-ro J. Sapirŝtejn, Poŝtkesto 23. PM, L, Esp. gaz., PI (bfl).

Petrograd. — S-ro Albino Korn, Fontanka 17. Kiu abonos por mi Esperanton Triumfontan, Novan Eŭropon, Esper. Finnlandon aŭ Esperanton (Ĝenevo), al tiu mi sendos (multnombre) rusajn PM (caraj, sovetaj, uzitaj kaj neuzitaj); esp. eldonaĵojn kaj ruslingvajn gazetojn kaj revuojn (laŭdeziro).

Petrograd. — F-ino Apollonia Pileva, Fontanka 17. Interŝanĝe por rusaj, sovjetajn PM deziras ricevi ĵurnalon de moda kostumoj (de Londona, Pariza, Berlina eld.).

Pskov. — F-ino Elena Purina, Zapskovje, Narvskaja ulica N II/13, loĝ. 7, dez. koresp. k. ĉ. l. per PI, L.

Sorokov. — S-ro A. Anisimov, Korelskoj Trudovoj de Komun, Zesopilnij zavod 37/38, dom. 80. PI, L, esp-aĵoj.

Svedio

Malmö. — S-ro Lennart Lundéll, kontoristo, Postfack 93, PM, L, PI, amatorfotaĵojn.

Malmö. — S-ro Frans Löfgren, kontoristo, Ludvigsro 1, PM, L, PI, amatorfotaĵojn.

Svislando

Chaux de Fonds. — S-ro F. Sandstein, Grenier 33, PI, PM k. ĉ. l.
Lugano-Paradiso. — F-ino Aurelia Cappello, PI (naciaj kostumoj, vidaĵoj, katedraloj).
Lugano. — S-ro Aloysio Cappello, Dir. de la Jurista Societo „La Difesa“, via Maghetti 2, PI, PK, PM, esp-aĵoj kaj fotografaĵoj (sportoj, belartoj, pejzaĝoj k. t. p.).

Afriko

Souk-El-Khemis (Tunizio). — S-ro Victor Svirchevsky, mekanikisto, Delaya, PI, L (pri aviado, mekaniko).

Ameriko

Buenos Aires (Argentino). — S-ro Luis Bernard, calle P. Mendoza N-ro 2275. PI k. ĉ. l.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Johano V. Bouzas. tipografiisto, Calle Cebollatí 1583. Kun ĉiulandaj samideanoj PI, L.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Alfredo Giacca, Calle Juan Paullier 1530. Kun ĉiuj landoj, PI, libroj pri sveda gimnastiko, esper., itala, angla kaj port. lingvoj.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Andreo Di Landro, Calle Francisco Llambi 176 (Pocitos), PI, L pri komercaj aferoj, naturismo kaj vegetarismo.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Severino Castro, Calle Ii n-ro 1649, PI.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Jacob Raijman, tipografiisto-linotipisto, Calle Convención 1575, kun ĉiulandaj samideanoj PI, L.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Emilio Cambralla, Calle Piedad 1576, pri stenografio por Esperanto.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Modesto Pernas, Av. Gonzalo Ranúrez 1370, PI.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Josefo L. Segarra, Calle Colón 1382, PI.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Adolfo De Cola, Calle Bequeló 2286, PI, L.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Sebastián Morey, instruisto, Calle Iaro 1341, pri moralo kaj filozofio.
Montevideo (Urugvajo). — S-ro Manuelo Fernández, instruisto, Calle Yaguarón 1523, pri desegno kaj dekoraciarto, PI de majstraj pentraĵoj kaj artaj monumentoj.
Moundsville, W. Va (Usono). — S-ro Herbert M. Scott, 1312 Purdy Ave, kunredaktoro de Amerika Esperantisto, PM. k. ĉ. l. prefere kun malnovaj filatelistoj. Ne sendos unue.
Panama (Canal Zone). — S-ro E. A. Young, 30, L (pri agnostikismo, terkulturo, laktfarmado). Rifuzos PI PM, monerojn k. t. p.
Philadelphia. — S-ro Wm. H. Fagan, 2010, Arch St., L, PI, k. ĉ. l.

Azio

Tokio (Japanio). — S-ro Kjukiĉi Matanuki, studento, 58, Ŝimo Takanaŭa Ŝiba, PM, L, PI (nur kun eksterlandoj).

JUNULA KORESPONDADO

Por ĉi tiu rubriko rezervata al junuloj maksimume 17-jaraj oni bonvolu indiki la aĝojn.

Leipzig—Leutzsch. — S-ro G. Streidt, Lindenauerstrasse 43 (kaj 11 geknaboj 13—15 jaraj) L, PI kun negermanaj landoj.
Pskov (Ruslando). — Es-isto Vitalij Tatarskij (14 jara), Zapskovje, Narvskaja N 44, kun junaj gesamideanoj.
Wurgwitz—Dresden. — S-ro Krumbiegel, instruisto kaj 40 infanoj (12—15jaraj), PI, L, PM kun eksterlando.
Wurgwitz—Dresden. — S-ro Scheibler, instruisto kaj 30 infanoj (13—16jaraj), PI, L pri lernejaj temoj kun eksterlando.

PETOJ KAJ PROPONOJ

Tarifo: Unu linio (= 10 vortoj) Fr. 0.50. Antaŭa pago.

En nacia mono: *Aŭstrio* 50 Kr.; *Belgio* 1 Fr.; *Britio* 5 d.; *Bulgario* 8 Lev.; *Ĉeĥoslovakio* 4 Kr. ĉ.; *Finnlando* 3 F. M.; *Francio* 1 Fr.; *Germanio* 4 M.; *Hispanio* 0.75 P.; *Hungario* 20 Kr.; *Italio* 1.50 L.; *Jugoslavio* 8 Kr.; *Nederlando* 0.25 Fl.; *Polio* 100 M.; *Skandinavio* 0.75 Kr.; *Svisio* 0.50 Fr.; *Usono* 0.10 D. — (Kie la aĉeto de respondkuponoj estas ebla, oni pagu per ili: 1 respondkupono = 20 centimoj.)

Angla familio ofertas komfortan hejmon dum libertempo. Bela apudmara urbo. Esperantistoj skribu al S-ino Sampson, 48, Windsor Road, Torquay.

Aŭstriajn poŝtmarkojn! Ĉu vi jam ĉiujn posedas? Ne? tiam skribu al la suba adreso! Mi liveras ĉiujn aŭstriajn poŝtmarkojn pli malkare ol ĉiu! Generale nur 50% de la katalogprezoj de Michl aŭ Yvert kaj Tellier. Kontraŭ referencoj mi ankaŭ sendas belajn elektaĵojn de aŭstriaj kaj alilandaj poŝtmarkoj. Josef Kolnhofer, Wien, 13./4. Zehetnergasse 37.

Bulgaraj poŝtmarkoj! Vendas laŭ ĉi tiuj prezoj: PM militaj 2·10 fr. frankoj (serion de 10 markoj). Bulgara „Poŝt en Romanio“ 0·45 fr. fr. (4 M.). Tzar Boris 0·30 fr. fr. (9 M.). Konfiskitaj 0·50 fr. fr. (5 M.). Militkaptitoj 2·60 fr. fr. (10 M.). „Baoutcher“ 2·40 fr. fr. (9 M.). Nunaj 2·50 fr. fr. (8 M.). Por mendo aldonu la sumon. Petu plenan katalogon. *Mendoj de pli ol 50 fr. frankoj kun 20% rabato.* Korespondas esperante, france. Kiril Manda, Kniaz Alexandre 55, Plovdiv (Bulgario).

Filatelistoj. — Aŭstriaj PM interŝanĝas kontraŭ anglaj, francaj, svisaj, turkaj, grekaj, bulgaraj, rumanaj, ukrajnaj, latviaj, letaj, estaj, rusaj, finnlandaj po 50—100 diversaj. Rajm. Čech, D'Orsayg. 7 23. Wien IX, Aŭstrio.

Filatelisto, kiu sendas al mi 100—500 poŝtmarkojn, al tiu mi sendos samvalorajn hungarajn markojn. Ne sendas unue. Zoltáno Székely, Budapest VII., Erzsébet-körut. 16.

Filatelisto. — 200 bonegajn malsamajn PM kun 3000 aliaj diversaj mi sendas kontraŭ 10 francaj frankoj. Brienne, 10, rue Belzunce, Paris.

Filatelistoj atentu! — Kiu sendas al mi 100—250 uzitajn poŝtmarkojn, al tiu mi sendos samvalorajn kvanton de bonaj germanaj poŝtmarkoj. Mi ne sendas unue. Antonio Ehm, Ali Akber, Poŝtfako 105, Zittau, Sachsen (Germanio).

Filatelistoj. — Mi serĉas seriozan pograndan (10—25) poŝtmarkinterŝanĝadon kun landoj ekster Eŭropo. Mi povas doni ĉion el Mezeuropo. Senf, Michel, bazo S-ro Braun László, Budapest II., Zivatar u. 14.

Franca lingvo. — Sam-no **Henri** Ménétrier en Drulingen (Bas-Rhin), Francio serĉas por sia fratino 17jara samcelaninojn, kiuj dezirus france korespondi kun ŝi Skribu al F-ino Marie-Louise Ménétrier, 67, rue de Zurich, Strasbourg, Francio.

Gvidlibroj. — S-ro J. Ravestein jr., del. UEA, van Aerssenstraat 200, Den Haag (Holando) petas alsendon de novaj esperantaj gvidlibroj (duoble) por instigi la neprofitemajn gvidantojn de la Nederlanda Turista Unuiĝo organizi grupvojaĝojn al tiuj koncernaj alilandaj urboj. Rekompence li sendos 56paĝan gvidlibron de Hago.

Hobart, Tasmania. — La delegito *tute ne* povas respondi al petoj por poŝtmarkoj, poŝtkartoj aŭ kolektantoj. Aliaj petantoj bonvole ĉiam sendu *du* respondkuponojn.

Kiu sendas 200 nedifektitajn ordinarajn PM ricevos la samvaloran kvanton da antikvaj aŭstriaj kaj hungaraj PM. Mi preferas ekstereŭrop. Sendu unue. Hahn, Wien IV, Argentin. 53. Aŭstrio.

Novajn aŭstriajn poŝtmarkojn liveras por la nominala sumo kaj 20% plialtiĝo en ĉiu nombro al ĉiu samideano Josef Kolnhofer, Wien, 13./4. Zehetnergasse 37.

Peto. — S-ro Alexandro Savastianov, Arkadak, Saratovska gub., Rusio, petas komuniki al li la nunan adreson de S-ro José Goriza, antaŭe Topete 115, Tarrasa, Hisp. kaj de S-ro Eric Biddle, Wylde Green, Western Rd., Birmingham (Anglio).

Politiko. — Pro la nesufiĉa apogo, ne aperos „La mondo politika“, sed la eldonanto dankas la multajn samideanojn, kiuj respondis lian anoncon.

Poŝtmarkoj. — Sendu al mi 100—300 PM miksitajn de via lando kaj mi sendos la saman kvanton nederlandan. E. L. Tintelman Aanslagweg A. 436. Borne Overijsel, Nederlando.

Poŝtmarkoj. — Mi deziras interŝanĝon de poŝtmarkoj kun Skandinavio, Baltaj ŝtatoj, Francio, Anglio, Suda Eŭropo kaj ekstereŭropaj landoj. Mi donas poŝtmarkojn de Finnlado kaj meza Eŭropo. Bazo Michel, Kürzl, SWK. Malpuraj kaj difektitaj sen afrankado resendotaj. T. A. Lindberg, Parola, Finnlando.

Ruslando. — Kiu deziras ricevi informojn pri Ruslando kaj enlandan esperantan kronikon sin turnu al *Petrograda Esperanta Informejo*, Petrogrado, Fontanka 17. (Ne forgesu aldoni 1 resp. kup.)

Serioza interŝanĝo. — Poŝtmarkserioj, poŝtkartaroj, papermono, moneroj. Profesoro José Ventura, 12, Roteros, Valencia (Hispanio), gvidanta Universitatan kurson. Nepre respondos — Malakceptas bagatelojn.

Subkonscio. — S-ro J. F. van Dam, Stille Veerkade 8, Den Haag (Holando), serĉas en ĉiuj lokoj korespondantojn, kiuj volas raporti pri spontanaj fenomenoj de la subkonscio, okazintaj en la regionoj, kie ili loĝas. La celo estas kunigi la raportojn kaj eldoni ilin siatempe broŝurforme. Por ke la informoj estu sufiĉe fidindaj, estas necese ke ĉiu raporto enhavu la precizan priskribon de la okazinta fenomeno, la daton kaj lokon, se eble la nomojn de la ĉeestantaj personoj. Pri la signifo de la vorto „subkonscio“, li emas akcepti la difinon, kion donas D-ro Morton Prince en sia verko: „The dissociation of a personality.“

INTERNACIA KOMERCO

Tarifo: sama kiel „Petoj kaj Proponoj.“

Berlin. — Ĉiuj komisioj estas zorgeme prilaborataj de F-ino Martha Rabe, Bandelstrasse 45 P. A. 21.

Ĉiuspecajn fabrikaĵojn deziratajn el Germanio vi je fabrikprezoj aĉetos per Internacia komercagentejo Emil Krempler, Sebnitz i. S. Centro de industrio. Aldonu al demando respondkuponon.

Eldonistoj. — Albert kaj Filo gravaj librovendistoj deziras interrilatiĝi kun libroeldonistoj kaj pograndaj librovendistoj en ĉiuj landoj. Korespondas, angle, germane aŭ Esperante. Sendu listojn al Albert & Son, Box 57, G. P. O. Perth, West Aŭstralia.

Grekio. — Salutas ĉiulandajn gesamideanojn. Donas senpage komercajn informojn pri ĉiuj grekaj komercaĵoj. Plezure helpas (ĉiam senpage) gesamideanojn vizitantajn unuafoje nian urbon. Deziras koniĝi kun eksterlandaj firmoj seriozaj, dezirantaj eksporti ĝiajn komercaĵojn al Grekio. Korespondas: angle, esperante, itale, france, germane, turke, greke, ruse. Skribu nur senŝanĝe: Maison de Commerce „Espero“. Le Pirée (Grèce).

Komercajn rilatojn serĉas kaj ofertojn petas la Komerca Eksport-Importa Oficejo de I. Krestanoff, Nicolaistr. 4-b, Dresden A. (Germanio).

Maŝinoj. — Ĉiujn maŝinojn por agrikulturo kaj industrio vendas, aĉetas kaj peras Ferdinand Jochmann, komercisto de maŝinoj. Pihl bei Haida (Ĉeĥoslovakio). Peranto de mondfama nordbohema vitroindustrio.

Negocojn ĉiuspecajn peradas Edgar Roitzsch, Sebnitz in Sachsen (Germanio). Vidu reklamon.

Plateno-metalon aĉetas k. vendas (nur prograndе k. laŭleĝe) Georg Reimann, Möckernstr. 71, r. III, Germanio (helpantoj ĉiulande serĉataj).

Pri moraleco. — Aĉetu: „La Principo de la Movado por Ĉasta Vivo“, pliklarigita el ideala kaj praktika vidpunktoj. Tradukis: C. J. Roskes-Dirksen. Prezo: fr. 0.25, afrankite fr. 0,30, rekomend. fr. 0,45. Rabato por kvantoj. Havebla ĉe D. Roskes, van Loostr. 68. den Haag (Nederlando).

Spongoj kaj salitaj sardeloj. Produkto kaj eksporto S-ro Salvatore Di Maggio-Lampedusa (Italujo).

LA FOIRO DE LYON

(KOMUNINTERESE UTILA LAŬ OFICIALA REGISTARA DEKRETO)

PREZENTAS DUM SIAJ DU KUNVENOJ

1–15 MARTO & 1–15 OKTOBRO

ĈIUN KRUDAN MATERIALON *ĈIUN TEKNIKAN NOVAĴON*

ĈIUN PRODUKTAĴON

Pliaj informoj estas senpage sendataj de „ADMINISTRATION DE LA FOIRE, HÔTEL DE VILLE, LYON“.

LA FOIRO DE LYON KORESPONDAS EN ESPERANTO.

ALIĜU TUJ

AL LA

XIV. UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

HELSINKI—FINNLANDO 8—16 Aŭgusto 1922

vi tiel plifaciligos la organizon al la L. K. K.

Edgar Roitzsch, Sebnitz i. S.

(Germanio)

Fabrikejo de

artefaritaj floroj, fruktoj kaj folioj, ligitaj aŭ unuopaj por ornamo de ĉapeloj, dekoracioj kaj tombgirlandoj

FLORAKCESORAĴOJ

Norvega komercĝardenisto serĉas reprezentadon por kreskaĵoj, semoj, artefaritaj floroj, rubandoj por kronfarado, preparitaj kreskaĵoj, funebro-aranĝaĵoj, korboj kaj aliaj akcesoraĵoj por la ĝardenistaj kaj kronfaristaj metioj.

Oni korespondas germane, france, holande, flandre sed preferas Esperanton.

Proponojn kun prezoj (event. kun specimenoj) oni sendu al

Chr. Larsen, ĝardenisto,
Trondhjem. Norvegio.

Internacia bela literaturo kaj instruaj verkoj.

Bennemann, Paul. **Tra la mondo.** Internacia legolibro.
Ia parto: Por komencantoj. Kun multaj bildoj kaj muziknotoj,
IIa eldono. Kartonite M 15·—
IIa parto: Por perfektuloj aperos en Junio 1922.
La unua eldono estas elĉerpita tri monatojn post apero.
Dietterle, Prof. D-ro Joh., Direktoro de la Saksa Esperanto Instituto.
La Vendreda Klubo. 11 originalaj artikoloj verkitaj de Vendredo-Klubanoj. Kun unu portreto kaj kelkaj desegnaĵoj. Broŝurite M 24·—
Prezo por bonvaluta eksterlando M 36·—
Goldschmidt, Thora. **Bildotabuloj por la instruado de Esperanto.**
Prilaborita de *Prof. D-ro Joh. Dietterle.* 2a korektita eldono
kartonite M 24·—, bindite M 30·—
Hebbel, F. **Gyges kaj lia ringo.** Tragedio kvinakta.
En Esperanton tradukita de *P. Bennemann* bindite M 30·—
Prezo por bonvaluta eksterlando M 45·—
Niemojevski, A. **12 Legendoj.** El la pola lingvo trad. *Br. Kuhl.*
(Kolekto: Internacia Mondliteraturo, vol. 2/3) bindite M 24·—
Prezo por bonvaluta eksterlando M 36·—
Raabe, Wilhelm. **La nigra galero.** El germana lingvo trad. *Prof. D-ro Wicke.* (Kolekto: Internacia Mondliteraturo, vol. 4) bind. M 12·—
Prezo por bonvaluta eksterlando M 18·—
Richter. R. **Esperanto-Gvidanto por la publika interkomunikiĝado.**
Preparilo por la ekzamenoj pri kapableco M 8·—
Thurston, Temple E. **La urbo de belega sensencaĵo.** Romano,
el la angla lingvo, trad. de *R. Spero* bindite M 30·—
Prezo por bonvaluta eksterlando M 45·—

Esperanto-Katalogo senpaga laŭ peto.

Prezoj ŝanĝeblaj.

Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-Fako, Leipzig, Salomonstr. 15.

MI SERĈAS ĈIAM

novaĵojn de ie ajn en la mondo por vendi en Anglujo, tiaspecajn vendeblajn al la „homo sur la strato“ je malaltaj prezoj!

Se VI iam vidas ian novan objekton kiun viaj samurbanoj aĉetas — patentartiklojn — ludilojn — galanteriaĵojn k. t. p. ne hezitu! Sendu tuj specimenon kaj ĉiujn detalojn. Mi volonte pagos por specimenoj kaj poste mendos pogrande taŭgajn objektojn pagante 5% rabato je ĉiu mendo al la koniganto.

MI HAVAS bonajn komercajn rilatojn kaj konsentus agi kiel reprezentanto por firmo deziranta vendi siajn produktojn en Anglujo.

FRED WILLAN, 151, WAIDS HOUSE Rd, NELSON, LANCS. ANGLUJO.

PRESEJO »POLITIKA«, PRAHA, ĈEĤOSLOVAKIO.